

Problemo de Etnaj kaj Naciaj Lingvoj

V. Sadler

D-ro V. Sadler, direktoro de la Centra Oficejo de UEA, feriiis en Japanujo ĉi-aŭtune. La 24-an de oktobro li faris prelegon pri la ĉi-supra temo, kun japana interpretado de T. Huĝimoto, ĉe la Kleriga Universitato por Urbanoj de Oocu. (Oocu, situanta proksime de Kioto, estis la kongresurbo de TEJO en 1965.)

Ni havas la plezuron prezenti ĉi-sube la plenan tekston de la prelego kun la afabla permeso de D-ro Sadler kaj la sekretario de la Universitato. — Red.

Usona lingvisto Mario Pei en iu sia libro deklaris, ke ekzistas en la mondo precize 2896 (aŭ eble 2986, mi jam ne memoras ĝuste) lingvoj. Mi ne volas diri, ke tio estas malvero; tamen mi certe ankaŭ ne intencas diri, ke tio estas vero. Anstataŭe mi deziras pensigi vin pri la senceco de tiaj statistikoj.

Se oni volus statistiki, kiom da belaj virinoj estas en Japanujo, oni unue devus iel decidi, kio precize estas bela virino. (Se iu volus finance subteni tian esploron, mi eventuale pretus entrepreni la laboron...) La rezulta statistiko povus esti ĝusta laŭ la juĝo de tiu, kiu starigis la kriteriojn de beleco, sed tuj troviĝos aliaj, kiuj trovos la kriteriojn malĝustaj. Simile, mi povas kredi, ke eble laŭ la difino de Mario Pei pri tio kio estas "lingvo", ekzistas en la mondo precize tiom da "lingvoj". Sed tuj troviĝas aliaj lingvistoj, kiuj malkonsentas kun li. Nederlanda profesoro C. C. Berg (Berĥ), ekzemple, estas mondfama specialisto pri la lingvoj de Indonezio. Kiam mi demandis lin pri la nombro de la tieaj lingvoj, li taksis ilin je eble 500 aŭ 600. Li aldonis, ke en Indonezio,

Fondita en 1925

Redaktoro: T. Nakamura

Administracio: OOMOTO, Kameoka, Kioto-hu, 621 Japanujo.

Telefono: Kameoka (2) 5561. *Poŝta ĝirkonto:* Kioto 25637 (Oomoto).

Presisto: Tensei-ŝa, Kameoka

Jara abono: 1200 enoj aŭ 12,—ned. guldenoj, **Abonebla** ĉe niaj “Reprezentantoj” kaj ĉe Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002 Nederlando.

Aŭstronezio kaj Polinezio certe troviĝas centoj da lingvoj, kiujn ankoraŭ neniam iu pristudis aŭ al kiuj ankoraŭ neniu eksterlandano donis nomon. En katalogoj de tieaj lingvoj aperas amase nomoj, kiuj tamen en multaj kazoj povas esti eraraj. Ofte du lingvistoj donis al unu sama lingvo malsamajn nomojn aŭ al malsamaj lingvoj saman nomon. Ankaŭ en Suda Ameriko, en Afriko kaj en Hinda Unio troviĝas lingvoj apenaŭ aŭ tute ne pristuditaj. Jam nur pro tiu fakto, do, la opinioj pri nombro de lingvoj tre varias. Sed mi volas montri al vi, ke la koncepto pri “lingvo” estas preskaŭ same tiel subjektiva kaj nestabila, kiel la koncepto pri virina beleco. Ankaŭ pro tio la taksoj pri nombro de

lingvoj estas sensignifaj, se oni ne samtempe klare difinas, kiamaniere oni decidis distingi aŭ identigi la lingvojn.

Bonvolu ne kredi, ke tia cerbumado pri difinoj estas nur intelekta ludo. Lingvo estas unu el la plej emocie ŝargitaj aspektoj de la homa konduto, kaj ĉie en la mondo okazadas kvereloj, konfliktoj, sinmortigoj, stratbataloj, ribeloj kaj tumultoj pro la lingvaj problemoj.

La homoj interkomunikiĝas pere de sonoj kaj skribsignoj. Tiun rimedon de komunikado ni nomas ĝenerale “lingvo” aŭ “lingvaĵo”. Kvankam psikologoj opinias, ke ĉe la homo la kapablo aŭ preteco lerni lingvon troviĝas jam denaske, — tio signifas ke ĝi apartenas al nia instinkta heredaĵo, — la lingvo mem neniel apartenas al instinktoj sed estas nura lernitaĵo. Japana bebo, kiu estus post la naskiĝo transportita en ekzemple araban familion, parolus kompreneble la araban lingvon same perfekte, kiel la aliaj familianoj, sen ia ajn influo de la japana deveno. Foje oni supozas, ke rasaj diferencoj, precipe en la formo de la buŝo aŭ nazo, devas influi la lingvon. Tamen ĉiam troviĝas esceptoj, kiuj pravas, ke tio ne estas vero. Mi vigle memoras, kiam mi en Cambridge foje staris en vico antaŭ kinejo kaj aŭdis malantaŭ mi voĉon de juna angla aristokrato. Turniĝinte, mi vidis, ke la voĉo apartenas al diklipa, tre nigrahaŭta negro — supozeble naskita en Britujo kaj lerninta prononcon, kiu neniel estis

influita de la korpaj diferencoj.

Sian unuan lingvon oni lernas en viva situacio — kutime de siaj gepatroj, sed foje ankaŭ de vartistino aŭ aliaj personoj. Por ĉiu persono en la mondo, la lernado estas malsama: eĉ ĝemelaj gefratoj ne ĉiam estas kune kaj ne ĉiam aŭdas la samajn vortojn de la samaj personoj. Sekve ankaŭ ili ekkreskas kun diverĝanta lingvoscio. Ne ĉiam la lingvoj estas lernataj aparte kaj sendepende unu de la alia. Ĵus mi vizitis familion de itala amiko, edziĝinta al japanino. La du infanoj vizitas anglalingvan lernejon en Tokio, kaj en sia aĝo de 5 kaj 7 jaroj ili ankoraŭ libere intermiksas la lingvojn. Oni aŭdas de ili frazojn kiel ekzemple: “Guardi, it’s nice, ne?”, en kiu kombiniĝas vortoj itala, anglaj kaj japana.

Certe tiuj du infanoj ne havas identan lingvoscion (eĉ se oni povus decidi, kiun lingvon entute ili parolas!). Ĉar entute ne ekzistas en la tuta mondo du personoj, kiuj parolas precize la saman lingvon. Tiu aserto povas ŝajni tro fantazia, sed, se vi pripensos, vi konsentos, ke estas iuj vortoj aŭ esprimoj, kiujn vi renkontis en tute specialaj cirkonstancoj; estas iuj vortoj, pri kies signifo vi ne estas tute certa, kaj kiujn vi do malofte uzas, eble erare. Finfine ĉies kompreno pri la signifo de vortoj estas bazita ne sur parkerado de dikaj vortaroj sed sur la sumo de multaj praktikaj ekzemploj, vivaj situacioj de la ĉiutaga vivo — kaj la sumo de tiuj spertoj neniam povas esti identa por malsamaj personoj. La difinoj en la vortaroj nur prezentas ian mezan valoron de la kompreno kaj uzado de tiuj personoj, kiuj kunlaboris en ĝia kompilado. Ankaŭ la voĉkvalito kaj persona prononcmankado, personaj diraĵoj kaj preferata stilo apartenas al tio, kion lingvistoj nomas “idiolekto” — la dialekto de la individuo.

Pro la ekzisto de idiolektoj, de personaj parolmanieroj, la homa komunikado neniam estas perfekta. Se iu diras al mi, ekzemple, ke li ĵus renkontis ĉarman knabinon, mi eble supozas junulinon 25-jaran, dum efektive li pensas pri knabino de lerneja aĝo. Mia gastiganto en Kopenhago antaŭ du monatoj foje diris, ke “baldaŭ revenos la du knabinoj”. Mi ne povis kompreni, pri kiuj knabinoj temas, ĝis li klarigis, ke temas pri lia filino 29-jara kaj edzino 50-jara. Por li, 60-jara, la edzino ankoraŭ restas knabino! Tamen, ju pli la homoj kunestadas, des pli ilia lingvaĵo interproksimiĝas. Tio estas precipe rimarkebla ĉe geedzoj. Estas interese konstati, ke tiu interproksimiĝo kutime estas nur unudirekta. Plej ofte la homoj estas aŭ adaptiĝemaj aŭ dominemaj. Tion oni povas rimarki ankaŭ ĉe fremduloj. Ekzemple, iu mia konato angla fariĝis profesoro en usona universitato. Malgraŭ multjara tiea vivado, lia brita prononco de la angla lingvo restis netuŝita. Li estas do homo, kiu atendas prefere, ke la usona popolo akceptu lian prononcon, ol ke li adaptiĝu al la ĝia. Mi mem, aliflanke, estas preskaŭ embarase adaptiĝema. Kiam mi dum pluraj monatoj kuŝis

en malsanulejo en lito apuda al tiu de juna irlandano, mi tiel rapide kaj pretervole adoptis lian fortan sudirlandan akcenton, ke mi komencis timi, ke li ofendiĝos, kredante, ke mi primokas lin. Eĉ se mi konscie klopodis por paroli al li per angla akcento, mi mizere malsukcesis.

Kiam ajn formiĝas homa grupo, tiu tendenco al intersimiliĝo de la individuaj lingvouzoj komencas efiki. Tiel formiĝas apartaj dialektetoj en familioj, en oficejoj, en amikaj rondoj kaj aliaj grupoj. En mia propra familio ni ĉiam uzis la anglan vorton “pudding” por “deserto”. Imagu do mian konsterniĝon, kiam mi unuafoje vizitis lernejon kaj trovis, ke miaj samklasanoj priridas tiun vorton. Ili ĉiuj parolis pri “afters”. Eble sub la influo de tiaj moko, mi rapide alproprigis al mi la vortprovizon, akcenton kaj gramatikon (aŭ fuŝgramatikon) de miaj samaĝuloj en la lernejo. Tamen baldaŭ miaj gepatroj ne plu eltenis tiun lingvaĵaĉon hejme kaj ordonis al mi ne plu paroli tiel. Jen do estiĝis la unua lingva konflikto, kiun mi memoras el mia propra vivo. Por solvi ĝin, mi devis lerni paroli hejme laŭ unu maniero kaj en la lernejo laŭ alia maniero. Mi fakte fariĝis dudialekta. En mia oficejo, kie mi nuntempe laboras, ekestis multaj specialaj diraĵoj, kiuj aŭ ekestis kiel lingvaj ŝercoj aŭ formiĝis kiel tempoŝparaj fakaj esprimoj rilatantaj al la laboro. En ambaŭ kazoj temas pri diroj, kiujn verŝajne neniu eksterulo povus kompreni sen klarigoj.

Tiuj miniaturaj ekzemploj klare montras la procedon, laŭ kiu estiĝas ankaŭ lokaj dialektoj de apartaj vilaĝoj, urboj aŭ regionoj. Mi klarigis, ke en ĉiu grupo la homoj emas intersimiligi sian lingvouzon pro tre bona motivo, nome, ke tio helpas la komprenon. Tiel do la homoj loĝantaj en unu loko plibonigas sian interkompreniĝon — sed samtempe, vole-nevole, ili apartigas sian lingvouzon de tiu de la ĉirkaŭaj lokoj. Mi scias, ke ankaŭ en Japanujo ekzistas grandaj dialektaj diferencoj. Ekzemple, la dialekta parolo de la loĝantoj sur la insuloj sude de Tokio estas grandparte nekomprenebla por Tokianoj. Tio devigas la insulanojn fariĝi dudialektaj, se ili volas interkompreniĝi kun homoj el Honŝu (Ĉefinsulo). La dialekto de pli junaj insulanoj estas tamen jam pli komprenebla por Tokianoj, ol tiu de la maljunaj, kio montras, ke la unueciĝo de dialektoj tra Japanujo supozeble progresas same kiel en multaj aliaj landoj, precipe sub la influo de tutlandaj radio, televido, telefono kaj aliaj komunikiloj.

Ankaŭ en mia propra lando, Britujo, ekzistas ankoraŭ gravaj dialektaj varioj de la angla lingvo (por nun ne paroli pri alispecaj lingvoj en Kimrujo, Skotlando kaj aliloke). Mi aŭdis antaŭ 13 jaroj magnetofonan registraĵon de dialekta parolado de iu maljunulino en nordorienta angulo de Anglujo. Ĝi estis por mi komplete nekomprenebla lingvo: eĉ ne unu vorton mi povis kompreni. Sed tre verŝajne tiu maljunulino intertempe forlasis ĉi tiun vivon, kaj jaron post jaro la dialektoj malfortiĝas sub la frapoj de la

kreskanta amaskomunikado. La longa historio kaj alta nivelo de la radio-televida instanco BBC certe kontribuis forte al tiu evoluo. Dum jardekoj la anoncistoj, raportistoj kaj komentistoj de BBC devis havi unu bazan kvalifikon: forte normigitan lingvaĵon similan al tiu de Oksfordo aŭ almenaŭ al tiu de burĝaj aŭ pli altaj medioj en suda Anglujo. Tiu neŝancelebla principo havis tre gravan influon; ĝi servis kiel modelo por ĉiuj en Britujo, kiuj deziris liberiĝi de siaj regionaj dialektoj kaj akiri parolmanieron, kiu permesus al ili interkomunikiĝi libere kaj egalece kun ĉiu ajn homo en la lando.

Estas interese konstati, ke tiu principo tamen estas forlasita en la lastaj, ni diru, 15 jaroj. La nuntempa estraro de BBC akceptas anoncistojn kaj aliajn kontribuantojn en radio kaj televido sen konsidero pri regionaj prononcmanieroj. Hodiaŭ oni aŭdas — almenaŭ en la enlanda servo de BBC — tre diversajn akcentojn. Ne plu oni prezentas kiel modelon la sudanglan normon, sed oni lasas al la aŭskultanto elekti normon ie inter la diversaj dialektaj formoj, supozeble kredante, ke tiamaniere ekestos iom post iom ia “tutbrita” meza prononco, kiu eble similos al neniu el la nunaj regionaj normoj. Kompreneble la tadidiciuloj de BBC estis profunde ŝokitaj de tiu ŝanĝo de politiko. Kiam mi hazarde renkontis la direktoron de la brita Tria Programo (la intelektula kanalo de la radio) en iu konferenco, li deklaris al mi, ke la angla lingvo “iras al la hundoj” (anglismo: iras al sia perejo) pro tiu revolucio. Tamen ĝis nun la hundoj ankoraŭ bojadas kaj la angloj ankoraŭ parolas angle.

Ankaŭ la usonanoj parolas angle, laŭdire — aŭ ĉu ili parolas usone? Se en Japanujo aŭ Britujo pli-malpli ekzistas tutlanda lingva normo, tiam estas kompreneble, ke ĝi estas rigardata kiel “lingvo” japana aŭ angla (brita), kaj ke la ceteraj formoj estas traktataj kiel malpli gravaj, malpli prestiĝaj “dialektoj”. Sed kiam la diversaj “dialektoj” estas la oficialaj lingvoj de malsamaj suverenaj ŝtatoj, ĉu iu el ili povas fariĝi la sola normo kaj forpuŝi la ceterajn? La angla lingvo estas la oficiala lingvo, aŭ unu el la oficialaj lingvoj, de Britujo, Usono, Aŭstralio, Sud-Afriko, Nov-Zelando, Kanado kaj pluraj aliaj landoj. Tamen oni ĝis nun ne povas diri, ke montriĝas tendenco al unueciĝo de la angla lingvo en unu dikektio aŭ alia.

Por alilingvanoj, ekzemple por japanoj, kutime la diferenco inter la brita angla lingvo kaj la usona angla lingvo ŝajnas pli granda, ol ĝi efektive estas, aŭ ol ĝi ŝajnas al anglalingvanoj. Tial kelkfoje alilandanoj parolas pri “brita” kaj “usona” lingvoj, sed neniam britoj aŭ usonanoj parolas tiel: ili parolas nur pri la “angla” lingvo. La kialo estas sufiĉe simpla. Japano kutime lernas aŭ la britan aŭ la usonan varianton de la lingvo. Cetere, kun tre maloftaj esceptoj, li sufiĉe malsukcesas en tiu lernado. Sekve, kiam li foje renkontas la alian varianton, li trovas ĝin tiel stranga, ke li estas iom

konsternita. Male, brito aŭ usonano, kiu jam bone regas sian gepatran lingvon, facile kutimiĝas al la alia varianto de ĝi. Por kaliforniano, ekzemple, ne estas pli fremda la brita angla lingvo ol la angla lingvo de Virginio aŭ de Bostono aŭ de juda, indiana, negra, portorika aŭ italdevena usonano, ĉar ja ĉiuj same multe diferencas inter si, kiel ili diferencas disde la brita angla lingvo. Estas interese konstati inter Britujo kaj Usono la paralelan efikadon de du kontraŭaj tendencoj: al disiĝo kaj al unueciĝo. Unuflanke daŭre ekestas novaj dirmanieroj je unu al la alia flanko de Atlantiko, kio do normale (kiel en pli fruaj jarcentoj) kondukus al pli granda malsameco de la du variantoj. Aliflanke la reciproka influo de gazetoj, diskoj, filmoj kaj similaj publikaĵoj estas tiel granda, ke senĉese la diverĝado estas nuligata, la novaj esprimoj konatiĝas kaj internaciĝas. Ekzemple, la esprimo "credibility gap" (la diferenco inter tio, kion asertas politikisto, kaj tio, kion la publiko pretas kredi) estiĝis en Usono kiel moka termino en la tempo de Watergate (Ŭotaget). Tamen tuj, dank' al radio kaj televido, ĝi transsaltis Atlantikon kaj estis aplikata de feliĉaj britaj raportistoj al politikistoj britaj!

Kelkaj el la plej popularaj novaj esprimoj en Britujo devenas el iuj absurdaj televidaj serioj, kiuj en la 50-aj jaroj fiaskis en Usono sed kiuj hodiaŭ ĝuas tie senprecedencan furoron kaj dissemas en usonajn buŝojn vortojn, kiujn la britoj kredis ekskluzive eŭropaj. La lingvaj manieroj kaj reciprokaj influoj foje returniĝas tajde de unu direkto al la alia. Dum la dua monda milito la kantoj de la anglino Vera Lynn (Vira Lin) tiel populariĝis en Usono, ke fariĝis modo kanti tie kun brita akcento. Post la milito la usona influo en Eŭropo tiel kreskis, ke neniu brita kantisto havis ŝancon sukcesi, se li ne kantis usonakcente. Sed en 1963 aperis konsterna fenomeno: grupo de junaj angloj, kiuj sub la nomo Beatles ne nur ne kantis usonece sed eĉ ne kaŝis sian nordokcident-britan akcenton — kaj kiuj tiel konkeris la mondon, ke denove la lingva modo refluis alidirekten.

Ĉiuj ĉi ekzemploj nur celas montri la potencon rolon de la modernaj amaskomunikiloj en la lingva evoluo. Se la registaroj iam permesos la enkondukon de tutmonda, libere elektebla televido — tiel ke ĉiu povos elekti TV-stacion en Usono aŭ Soveta Unio aŭ Brazilo aŭ Japanujo, anstataŭ nun tiujn de la propra lando — tiam oni povos atendi plian drastan unueciĝon de la naciaj lingvoj papolataj en diversaj mondpartoj. Tio do precipe rilatas al la angla lingvo, al la franca lingvo de Francujo, Belgujo, Svislando kaj Kanado, al la portugala lingvo de Portugalujo kaj Brazilo, al la hispana lingvo de Hispanujo kaj de la amerikaj ŝtatoj, al la araba lingvo kaj al kelkaj aliaj. Eble tiam venos tempo, kiam la normo de la angla lingvo similos al la prononco de interpretistino, kiun mi aŭdis en konferenco de Unesko en Parizo. Kiam mi inter la sesioj, malsukcesinte diveni ŝian

naciecon, starigis al ŝi tiun demandon, montriĝis, ke ŝi naskiĝis en Ĉinujo kiel filino de Usonano kaj Anglino, sed pasigis siajn lerneajn jarojn en internacia lernejo en Svislando. Mi konsolis min pro mia malsukceso per la fakto, ke ŝi ankaŭ ne sukcesis diveni mian devenon.

Ĉiuokaze ni jam vivas en epoko de rapida firmiĝado de la pozicio de naciaj lingvoj apartenantaj al ŝtatoj. Senkonsidere, ĉu okazos nova drasta unueciĝado dank' al estonta enkonduko de tutmondaj televidelsendoj per satelitoj, jam nun la modernaj komunikiloj iom post iom ekstermadas la dialektojn kaj la malgrandajn lingvojn. Tiu procedo ne estas nova — kvankam la telekomunikado certe plirapidigis ĝin. Jam de jarcentoj la formiĝo de pli grandaj politikaj aŭ administraj unuoj necesigas unuecigon de la lingvo en la limoj de tiuj unuoj. Estis iam tempo, kiam tra la tuta meza parto de Eŭropo, de nuna Belgujo ĝis la limoj de la nuna Aŭstrujo, estis parolataj multaj diversaj dialektoj ĝermanaj. Antaŭ ol Martin Luther (Luter) per sia germanlingva bibliotraduko unuecigis multajn el tiuj dialektoj kaj kreis novan, artefaritan literaturan lingvon — la hodiaŭan germanan lingvon — neniu el tiuj dialektoj parolataj — kaj eĉ skribataj, tre diversmaniere — en unuopaj malgrandaj princlandoj aparte elstaris super la aliaj. Vojaĝanto, kiu trapasus tiujn landojn sufiĉe malrapide, restante eble po kelkajn monatojn en ĉiu loko, facile adaptiĝus tiutempe al ĉiu nova dialekto, kiun li renkontus. Tiamaniere, en la fino de sia vojaĝo li trovus, ke li jam parolas tute alian lingvon, ol en ĝia komenco, kvankam la transiro okazis nur po etaj paŝoj. Ankoraŭ hodiaŭ restas spuroj de tiuj dialektoj, almenaŭ en la parola formo. Proksime de la landlimo inter Nederlando kaj Germanujo la lokaj enloĝantoj parolas inter si dialektojn, kiuj estas nek la nederlanda nek la germana, sed kiuj estas reciproke kompreneblaj. Memkompreneble, kiel civitanoj de modernaj ŝtatoj, ili devas scipovi ankaŭ la nederlandan aŭ germanan lingvon respektive. Sed, se ili scipovus nur tiujn tutlandajn lingvojn, ili ne kapablus interkompreniĝi kun siaj najbaroj tuj trans la limo. Cetere, por mi, kiu parolas kaj la germanan kaj la nederlandan lingvojn, tiuj landlimaj dialektoj estas nekompreneblaj.

La nederlanda kaj germana lingvoj donas al ni bonajn ekzemplojn de tio, pri kio mi parolis komence de ĉi tiu prelego: la malfacileco difini, kio precize estas “lingvo”. Oficiale, la germana lingvo estas parolata en Federacia Respubliko Germanujo, en Germana Demokratia Respubliko, en Svislando kaj en Aŭstrujo. (Kompreneble ĝi ekzistas kiel minoritata lingvo ankaŭ en pluraj aliaj najbaraj ŝtatoj.) Estas vero, ke en Svislando kaj en Aŭstrujo oni ĝenerale scipovas paroli la normigitan germanan lingvon. Sed la lingvo, kiun normale parolas svisgermanoj inter si, estas tiel stranga, ke la germanoj mem nomas ĝin malsano. Por mi ĝi restas tute nekomprenebla. Same la ĉiutaga lingvo de Vienanoj, kvankam mi tre ofte aŭdas ĝin

parolata en restoracio de Vienanoj en Rotterdam, permesas al mi kapti nur unu-du vortojn de tempo al tempo. Tamen oni tion nomas la germana lingvo.

Aliflanke, oni de longe faras distingon inter la nederlanda lingvo parolata en Nederlando kaj la “flandra” lingvo parolata en Belgujo. Inter tiuj du ĝeneralaj formoj la diferencoj estas vere malgrandaj. Eĉ mi, eksterlandano, facile komprenas ilin ambaŭ. Simile oni faras distingon inter la serba kaj kroata lingvoj en Jugoslavio, kvankam la ĉefa diferenco estas eble la uzo de malsamaj alfabetoj: serboj kaj kroatoj tute facile interkompreniĝas. Neniu iam parolas pri la “ĉeĥoslovaka” lingvo, sed ĉiam distingas inter la ĉeĥa kaj slovaka. Tamen ankaŭ ili estas reciproke kompreneblaj. La du oficialaj lingvoj de Sud-Afriko estas la angla kaj la afrikansa. Tiu afrikansa, malgraŭ sia nomo, ne estas indiĝena afrika lingvo sed estas formo de la nederlanda lingvo, portita tien de la nederlandaj enmigrintoj. Origine ĝi neniel diferencis de la nederlanda lingvo de Nederlando, sed iom post iom ekestis aparta prononco kaj fine ankaŭ aparta skribmaniero. Kvankam ĉiu nederlandano facile komprenas ĝin, oni nepre ĉiam nomas ĝin la afrikansa lingvo. Tiuj kelkaj ekzemploj montras, ke la uzo de la nomoj “lingvo” kaj “dialekto” ofte ne dependas de lingvistikaj, objektivaj kriterioj, sed de politikaj subjektivaj kriterioj. Se oni volas kredi, ke oni parolas apartan lingvon, oni donas al ĝi apartan nomon; se oni volas identigi sin kun alia lingva grupo, oni diras, ke oni parolas ĝian lingvon, eĉ se la vero estas iom alia. La sudafrikanoj estas fieraj, memstara popolo reganta teritorion en Afriko. Ili estus tre ofenditaj, se oni dirus, ke ili parolas dialekton de la nederlanda lingvo. La loĝantoj de la landlimaj regionoj en orienta Nederlando, aliflanke, estus tre mirigitaj, se oni dirus, ke ili parolas propran lingvon kaj se oni eĉ donus al ĝi propran nomon, ĉar ili rigardas sin kiel civitanojn de Nederlando kaj opinias, ke ili parolas ĝian oficialan lingvon. Tamen la lingvo, kiun ili parolas, estas pli malsimila al la nederlanda, ol tiu de Sud-Afriko.

Efektive, la distingo inter “lingvo” kaj “dialekto” ne estas objektive farebla. Iuj lingvistoj klopodis apliki la nomon “lingvoj” al tiuj parolformoj, kiuj estas reciproke nekompreneblaj. Tamen restas la demando, ĝis kiu grado nekompreneblaj. Verdire, ne eblas fiksi ian klaran distingilon, kaj sekve la terminoj ne havas ian sciencan utilon, kvankam populare oni povas uzadi ilin.

Sed ni revenu al la evoluo de la lingva situacio en la mondo. Parolante pri lokaj dialektoj mi jam diris, ke kiam formiĝas tia loke unueca parolformo, samtempe kaj neeviteble ĝi distancigas sin disde la ĉirkaŭaj parolformoj. Tiun saman principon ni vidas ankaŭ en pli granda skalo, kiam temas ne pri loka, sed pri tutlanda aŭ eĉ internacia unuecigo. En la

jam menciita ekzemplo de la formiĝo de la germana kaj nederlanda lingvoj el granda nombro da parencaj dialektoj, la starigo de unuecaj naciaj normlingvoj ege faciligis la interkompreniĝon interne de Germanujo kaj Nederlando respektive, sed samtempe akriĝis la lingvan diferencon inter tiuj du landoj kaj malfaciligis la komunikadon inter ili. Lingva naciismo — la manipulado de lingvo por akiro aŭ firmigo de politika superregado — estas en tiu senco malamiko de internaciismo. Tion klare montras la ekstrema kazo de la hitlera Germanujo. Sub la nazia reĝimo la germana lingvo estis same glorigata, kiel la germana “raso”. Same kiel la tiel nomata raso estis “purigata” per eliminado de personoj miksdevenaj, tiel ankaŭ la lingvo devis esti purigita. Fremdvortoj, kiuj ĝis tiam estis tute normale uzataj en la germana lingvo, devis esti eliminitaj. Internaciaj vortoj kiel “Automobil” estis anstataŭigitaj de pezaj kunmetaĵoj el pli malnovaj germanaj vortoj, kiel “Personenkraftwagen”, kiun oni baldaŭ, ĝuste pro ĝia malebla pezeco, mallongigis per “PKW”. Memkompreneble, la germana lingvo fariĝis per tiuj devigaj ŝanĝoj malpli facile lernebla por alilandanoj. Sed tio ja ne gravis, ĉar ĝi ĉiuokaze estis destinita, laŭ la naziaj konceptoj, fariĝi la estonta mondlingvo de la vasta germana regno.

Lingvo kaj politiko estis ĉiam intime ligitaj. Lingvo estas la ilo, la rimedo, per kiu politikaj ideoj esprimiĝas kaj estas disvastigataj kaj per kiu la regantoj administras sian teritorion. Kaj, ĉar naciismo — la formiĝo de unuecaj suverenaj ŝtatoj plejofte surbaze de unu lingvo — estis la plej elstara fenomeno en la disvolviĝo de la hodiaŭa politika situacio en la mondo, ankaŭ lingvo kaj naciismo estas tre forte interligitaj. Ne nur lingvo estis plejofte la bazo, sur kiu estis konstruitaj la nacioj, sed poste tiuj nacioj, tiuj politikaj institucioj, siavice forte influas la lingvojn parolatajn en iliaj limoj.

Mi deziras nun rapide skizi la lingvan situacion kaj precipe la lingvajn problemojn en diversaj landoj de la mondo konkrete, unu kontinenton post alia. Farante tion, mi samtempe evidentigos problemojn apartenantajn ne al unu aŭ alia mondparto sed al unu aŭ alia sfero de la vivo: al la edukado, al la scienco kaj tiel plu. Tio kondukos min al unu sfero relative nova, kie la lingvaj problemoj estas aparte akraj kaj interesaj: tiu de la internacia vivo kaj la internaciaj institucioj kiel Unuiĝintaj Nacioj.

Estante en Azio, la plej multe loĝata kontinento de la mondo kaj certe ankaŭ la plej multlingva, mi eble devus komenci per ĝi. Tamen permesu, ke anstataŭe mi komencu en Eŭropo, kiun mi plej bone konas kaj kiu plej multe influis la lingvan situacion en aliaj kontinentoj.

Post la traŭmoj de la unua monda milito, la packontraktoj de 1919 grandparte redeseĝnis la eŭropajn landlimojn laŭ lingvaj konturoj. Tio plifortigis la jam ekzistintan tendencon al identigo de ŝtatoj kun nacioj,

difinitaj per iliaj respektivaj lingvoj. Devigaj translokigoj de la loĝantaroj de difinitaj regionoj post la dua monda milito plue kontribuis al la lingva solidareco de la unuopaj ŝtatoj. Kaj ankoraŭ hodiaŭ ni vidas tiun saman tendencon. Sur la insulo Kipro, ekzemple, la popoloj turka kaj greka (kiujn dividas ne nur la lingvo sed ankaŭ la religio) loĝis forte intermiksita. Praktike ĉiu urbo havis parte grekan, parte turkan loĝantaron. Post la malsukcesa ŝtatrenverso de grekaj oficiroj kaj la sekva invado fare de la turka armeo, la insulo estas dividita en grekan kaj turkan partojn, kaj ĉiam pli la malfeliĉuloj, kiuj hazarde trovis sin en la malĝusta parto, estas translokigataj al la “ĝusta”. Estas tre dubinde, ĉu ili iam povos reiri al siaj hejmoj. Pli verŝajne la du nacioj estonte vivos sur propraj apartaj teritorioj kun apartaj administracioj. Tio certe estos pli praktika, ĉar la regado de dulingva teritorio, kiom ajn justaj estas la intencoj de la regantoj, tro facile komplikiĝas pro akuzoj, ke la regado ne estas senpartia inter la du etnaj grupoj. Des pli facile, kiam temas pri lingvoj kiel la greka kaj turka, apartenantaj al tute malsamaj lingvofamilioj, tiel ke dulingvuloj estas relative maloftaj. La interŝanĝado de loĝantaroj cetere ne estas senprecedenca en tiu regiono: hodiaŭ vivas en Grekujo multaj grekoj siatempe fuĝintaj el Turkujo, kaj inverse.

Alia dulingva lando, en kiu regule okazas malpaco pro la lingva politiko, estas Belgujo. Iom pli ol la duono de la belga popolo parolas la flandran (aŭ nederlandan) lingvon; el la ceteraj la plimulto parolas la francan, dum malgranda minoritato parolas germane. Dum tre longa tempo, la franclingvanoj tenis la socian kaj politikan potencon en Belgujo. Ili konsistigis la plej grandan parton de la loĝantaro de la ĉefurbo, Bruselo; ili okupis la ĉefajn gvidajn funkciojn en la industrio; kaj ili malestimis la flandrojn kaj ilian lingvon. Laboristoj devis paroli france al siaj estroj. La franca lingvo estis deviga en la lernejoj, la flandra estis neglektata. Nur en la lastaj jardekoj la flandroj konsciiĝis pri sia nombra supereco kaj pri la diskriminacio, kiu estis praktikata por bari al ili la vojon al politika potenco. Sub la gvido de fajraj oratoroj kaj organizite en la t. n. Flandra Movado, ili batalis por siaj lingvaj rajtoj — sur stratoj, en la parlamento, sur gazetoj, en ĉiuj medioj de la vivo. La lingvo estis la ŝlosilo al ĉiuj aliaj rajtoj sociaj kaj politikaj. Kiam mi veturis trajne en Belgujo antaŭ eble 10 jaroj, mi ion demandis franclingve al kelnerino. Ŝi respondis kolere kaj fiere: “Mi parolas flandre”. Mi do ŝanĝis la lingvon kaj klarigis, ke mi estas eksterlandano, kiu ne havas preferon por la franca aŭ la flandra lingvo. Ŝi sendube scipovis paroli france, sed volis nepre uzi ĉiun okazon por insisti pri la pozicio de la flandra. Tra la lastaj jaroj la flandroj elbatalis tutan serion da novaj leĝoj pri lingva egalrajteco. Mi dubas, ĉu hodiaŭ povus okazi tia sama incidento en trajno de la belga ŝtata fervojo,

ĉar laŭ la nunaj leĝoj ĉiu civitano rajtas ricevi de ŝtataj instancoj respondon en sia propra lingvo. Dulingvismo fariĝas teorie deviga. Kvankam la ŝtato fariĝas dulingvisma kaj la rajtoj de ambaŭ lingvaj grupoj estas efektive ĉiam pli efike protektataj, la rezulto de la multjara batalo estas, ke la popolo estas pli ol iam dividita spirite. Eĉ tiuj, kiuj fakte scipovas ambaŭ lingvojn, ofte rifuzas paroli alian ol sian gepatran. En la orienta provinco Limburgo, kie mi promenis antaŭ du-tri jaroj, la vilaĝoj franclingvaj kaj flandringvaj estas tre intermiksita. Sekvante iun ŝoseon, oni venas alterne jen al franca, jen al flandra teritorio. Se oni volas demandi iun kamparanon pri la ĝusta direkto, oni devas diveni, en kiu lingvo necesas formuli la demandon. Se oni malĝuste divenas, plej ofte oni ricevas eĉ ne la respondon, ke la lingvo estas la malĝusta. La demandito kutime simple turnas al vi la dorson. Malgraŭ multaj tumultoj, malofte en la lastaj jaroj fluis sango en Belgujo pro la lingva problemo. Tamen la sentoj, nun malamikaj kaj malvarmaj, estas ĉiam potencie eksplodaj. Federacia solvo — en kiu ambaŭ grupoj estus administre sendependaj — estas malfacile imagebla, kiam la loĝantaroj estas tiel intermiksita, kiel en Belgujo, precipe en la ĉefurbo Bruselo.

La flandroj, estante fizika plimulto, sukcesis elbatali siajn lingvajn rajtojn. Ne tiel feliĉa estas la pozicio de la malpli grandaj lingvaj grupoj. Pri la rajtoj de la germanlingvanoj en Belgujo, ekzemple, apenaŭ iu parolas, ĉar la francoj kaj flandroj estas tro okupitaj per sia interbatalo por pensi pri iu alia. Alia batalo, pri kiu verŝajne raportis ankaŭ la japana gazetaro en la lastaj semajnoj, ilustras la situacion de multaj malpli grandaj etnoj en Eŭropo. En Korsiko, franca provinco insula en Mediteraneo, okazis sanga batalo inter policanoj el Francujo kaj korsikaj naciistoj, kiuj protestis pro la ĉiam pli granda transprenado de korsika tero fare de komercistoj el Francujo. Kiel kutime, la batalo por la rajtoj de minoritato ne estis pure politika aŭ pure ekonomika. Ĉi-foje eĉ ne temis unuavice pri lingvaj rajtoj. Tamen la korsikanoj estas unu el sep etnaj grupoj en Francujo, kiuj ĝuas preskaŭ nenian lingvajn aŭ kulturajn rajtojn sed estas subpremataj en la intereso de nacia (tio estas: tutfranca) unueco. Ĉirkaŭ 200 000 korsikanoj parolas lingvon, kiu apartenas al la itala grupo. Sed tiu lingvo havas preskaŭ nenan pozicion en la lernejoj kaj tute ne povas esti uzata por oficialaj aŭ publikaj celoj. La situacio por la aliaj minoritatoj estas simila. Precipe la bretonoj, popolo kun duonmiliono da anoj, estas rezistemaj al la centralisma politiko de la francaj aŭtoritatoj.

Kiam temas pri malgrandaj lingvaj grupoj oni kompreneble rajtas dubi, ĉu ilia batalo por kultura sendependeco estas vere celtrafa. Malantaŭ la flandroj de Belgujo staras 13 milionoj da samlingvaj nederlandanoj. Malantaŭ la grekoj kaj turkoj de Kipro staras la sendependaj popoloj de

Grekujo kaj Turkujo. Sed malantaŭ la bretonoj, ekzemple, staras neniu. Kompletasimiliĝo en la francan nacion kaj formorto de la bretona lingvo donus al ili la avantaĝon, ke ili estus kapablaj egalnivele konkurenci kun francoj, ekzemple kiam temas pri ŝtataj oficoj. Agnosko de ilia rajto al lingva kaj kultura sendependeco donus al ili fortan senton de nacia aparteno sed malfortigus ilian scion de la franca lingvo kaj sekve ilian kapablon konkurenci en la franca ekonomia sistemo.

Efektivigon de tiu dua ebleco ni vidas en la hodiaŭa Jugoslavio. Jugoslavio estas ŝtato federacia, konsistanta el pluraj respublikoj kun pluraj diversaj lingvoj. En la lastaj jaroj la minoritatoj kaj pli malgrandaj respublikoj atingis altan gradon de lingva egalrajteco. En la federacia parlamento estas uzataj ĉiuj pli gravaj lingvoj de la lando, kun sistemo de samtempa interpretado simila al tiu de Unuiĝintaj Nacioj. Eĉ malgrandaj lingvaj grupoj kiel la italoj havas en Jugoslavio siajn proprajn televidelsendojn, ĵurnalojn kaj aliajn avantaĝojn. Sed la ĉefurbo de la federacio restas Beograd, kaj la granda plimulto de la tuta popolo loĝas en la teritorio de la serbokroata lingvo. En ĝi kuŝas do la efektiva potenco. Kvankam la lingvoj estas teorie egalrajtaj, tamen Beogradano, kiu vizitas la okcidentan respublikon Slovenio, atendas, ke ĉiu tie povos interkompreniĝi kun li per la serba lingvo. Sloveno, kiu vojaĝas al Beograd, aliflanke, neniam venus al la ideo postuli, ke oni tie komprenu lian slovenan lingvon. La egalrajteco restas do unudirekta. Konsideru nun la karieron de infano, kiu elkreskis en la hodiaŭa Makedonio, la plej malriĉa kaj postrestinta respubliko de Jugoslavio. Dank' al la nuna lingva politiko, tiu infano povas nun ĝui sian tutan edukadon en sia gepatra makedona lingvo, legi ĵurnalon kaj librojn, aŭdi radion kaj rigardi televidon en la makedona. Sed, kiam li estos sufiĉe aĝa por serĉi laboron, li estos devigita serĉi unuavice en sia propra postrestinta respubliko, ĉar lia scipovo de la serba lingvo ne estos sufiĉe bona por certigi al li oficon en la pli riĉaj respublikoj de la lando. Ankaŭ por lia plua kleriĝo, kompreneble, la nombro kaj kvalito de libroj haveblaj en la pli granda serbokroata lingvo ĉiam estos pli granda, ol en la makedona.

Tiu neegaleco de la lingvoj sur la literatura kaj scienca — kaj sekve ankaŭ sur la kleriga — kampoj manifestiĝas ankaŭ aliloke en Eŭropo, ankaŭ inter sendependaj ŝtatoj. La dana, ekzemple, kun nur 4 milionoj da parolantoj, estas lingvo kun longa historio, valora literaturo beletra kaj scienca, kaj vigla moderna kulturo. Tamen el nure kvanta vidpunkto ĝi ne povas rivali kun ekzemple la angla. Universitataj studentoj en sciencaj fakultatoj ne povas malhavi la anglan lingvon por siaj studoj, ĉar la granda plimulto el la literaturo kiun ili bezonas studi estas skribita en tiu lingvo. Estas memkompreneble, ke pro tio ili kutimiĝas pensi pri la koncernaj

sciencaj temoj ne en la dana, sed en la angla lingvo ; ke pro tio ofte mankas al ili danlingvaj terminoj ekvivalentaj al diversaj fakaj esprimoj en la angla ; kaj ke fine, kiam ili mem ekverkas sciencajn disertacion aŭ artikolon, ili plej ofte trovas pli facila verki ĝin en la angla, kio samtempe garantias al ĝi pli vastan legantaron, ol ĝi akirus per la dana lingvo. Iu studento, kiu pro amo al la dana lingvo kaj kulturo decidus studi nur pere de tiu lingvo, certe kontribuos al la evoluigo de la dana scienca terminaro kaj riĉigo de ĝia literaturo ; tamen li samtempe metus sin en forte malavantaĝan pozicion kompare kun aliaj studentoj, kiuj ne havus tiajn skrupulojn. Krome li devigus sin poste serĉi oficon en Danlando aŭ alia skandinavia lando, kies lingvo estas sufiĉe komprenebla por danoj, dum aliaj studentoj povus eklabori en iu ajn el la anglalingvaj landoj aŭ en aliaj landoj, kie la angla servas kiel lingvo de industrio kaj scienco.

Simila estas la situacio en Nederlando, malgraŭ tio, ke la nederlandan parolas multe pli da homoj, ol la malgrandan danan lingvon. El ĉiusemajne publikigata listo de novaj eldonaĵoj aperintaj en Nederlando oni vidas, ke preskaŭ ĉiuj sciencaj verkoj de nederlandaj aŭtoroj aperas angle. Mi mem facile povus vivteni min en Nederlando, enspezante nur pro korektado kaj polurado de la angla lingvaĵo de tiaj verkoj. Tamen tio estus ege enuiga laboro. Mia edzino, kiu studis medicinon pere de la angla lingvo, povis labori en nederlandaj malsanulejoj kiel kuracistino kun preskaŭ neniom da scipovo de la nederlanda lingvo. Ŝi povis interrilati kun la aliaj kuracistoj anglalingve, dank' al la fakto, ke ankaŭ ili siatempe devis vole-nevole studi pere de la angla. Nur kiam ŝi eklaboris en malsanulejo de Germanujo, ŝi nepre devis eklerni la germanan lingvon. Tie preskaŭ neniu kuracisto scipovis la anglan. Verŝajne en la plimulto de eŭropaj landoj ŝi ne povus labori en la medicina kampo uzante nur la anglan lingvon.

Tio kondukas min al alia aspekto de la nuntempa eŭropa lingva situacio. Entute karakterizas ĝin en ĉi tiu jardeko du gravaj fenomenoj. Unu el ili estas la jam priskribita batalo de lingvaj minoritatoj kontraŭ asimiliĝo en pli grandajn naciojn. Pri tio mi donis kelkajn ekzemplojn sed povus doni ankoraŭ tre multajn aliajn, el kiuj eble la plej aktuala estas tiu de la baskoj kaj katalunoj en Hispanujo. La alia fenomeno estas la migrado de laboristoj.

Kompreneble la eŭropanoj ofte migris de unu lando al alia por serĉi pli bonajn vivkondiĉojn — ne nur interne de Eŭropo sed ankaŭ al Ameriko kaj aliaj kontinentoj. Sed en la lastaj jaroj okazis grava kvanta ŝanĝo. Ĉiu civitano de la landoj de Eŭropa Ekonomia Komunaĵo havas aŭtomate la rajton ekloĝi kaj eklabori en ĉiu ajn alia lando de EEK. Mi mem, estante brita ŝtatano, rajtas do iri kaj labori en Francujo, Italujo, Belgujo, Nederlando, Luksemburgo, Danlando, Irlando aŭ Federacia Respubliko Germanujo

tute laŭ mia kaprico. Por tio mi bezonas nenian specialan permeson de la koncerna lando. La samo validas por ĉiuj aliaj civitanoj. Mi persone opinias tion unu el la plej gravaj aspektoj de la nuntempa politika evoluo en okcidenta Eŭropo. Eĉ se mi tion ne utiligus, por mi estus ĉiam trankvilige kaj agrable pripensi, ke mi havas kompletan liberecon vagi tra tiuj naŭ landoj — kiuj cetere verŝajne plimultiĝos poste — kaj restadi tie laŭ mia plaĉo. En la praktiko, la migradoj de laboristoj inter la landoj de EEK ne estas tiel amasaj, kiel oni povus atendi. Parte tio ŝuldiĝas al la fakto, ke ne ekzistas eksterordinaraj diferencoj de vivnivelo inter tiuj 9 landoj. Parte kaŭzis ĝin la fakto, ke tiuj 9 landoj havas 7 oficialajn lingvojn. Estus por mi, ekzemple, malfacile eklabori en Danlando, ĉar la danan lingvon mi apenaŭ komprenas. En la nuna tempo la plej grandaj migradoj okazas ne el la landoj de EEK sed el landoj ekster ĝi, kie la vivnivelo estas multe pli malalta kaj laboro malfacile aŭ tute ne trovebla. Temas pri landoj kiel Maroko, Portugalujo, Hispanujo, Grekujo, Turkujo, Jugoslavio, kaj la ekskolonio nederlanda en Sudameriko, Surinamo. En la strato, kie mi loĝas en Rotterdam, la granda plimulto el la enloĝantoj estas eksterlandanoj: ĉefe surinamaj, turkaj kaj jugoslavaj. La lingvo plej ofte aŭdata surstrate estas la turka. Ekzistas apartaj trinkejoj kaj butikoj por la diversaj naciaj grupoj. Butikfenestroj havas surskribojn en la hispana, turka aŭ greka. Specialaj gazetoj estas publikiĝataj por multaj el tiuj grupoj kun financa subteno de la nederlanda ŝtato. Regule okazas en Rotterdam'aj kinejoj filmprezentoj en ties lingvoj, koncertoj allogas la plej grandajn stelojn de la hejmlandoj kanti aŭ danci por siaj samlandanoj kvazaŭ ekzilitaj, kaj en la ŝtata televido kaj radio estas rezervitaj apartaj tempoj ĉiusemajne por elsendoj en la respektivaj lingvoj.

Tiu fenomeno ne estas speciale nederlanda. Ĝi reaperas — kun aliaj etnaj konsistoj — en Londono kaj Hamburgo, en Stokholmo kaj Zuriko, en multaj aliaj urboj. Kion tio signifas por la lingva situacio en Eŭropo? En la nuna skalo la rezultoj ne estas tro drastaj, sed tamen evidentiĝas, ke tiu intermiksiĝado de la popoloj kaŭzas kreskantan konscion pri la lingvaj problemoj, precipe ĉe socialaj laborantoj, lernejoj instruistoj, policianoj kaj aliaj, kiuj nun ĉiutage frontas barojn de nekomprene. Ĝenerale estas farataj iaj klopodoj por instrui al enmigrintaj laboristoj la lingvon de la koncerna lando, sed la rezultoj ne estas kontentigaj, parte pro manko de taŭgaj instruistoj kaj lernolibroj, parte pro la fakto, ke ekzemple turko, kiu eklaboras en Nederlando, ne vidas utilon en peniga studado de la nederlanda lingvo, ĉar li konscias, ke tre verŝajne li post unu-du jaroj devos denove migri ekzemple al Britujo aŭ Germanujo kaj trovi novan laboron tie, kie la nederlanda lingvo estos komplete senutila.

Mi dediĉis jam tiom da tempo al priskribo de la eŭropa lingva situacio

— kvankam apenaŭ ektuŝante ĝian surfacon, ke ne estas eble dediĉi similan tempon al la aliaj kontinentoj. Sed tio ankaŭ ne estas necesa, ĉar ne estas mia celo detale priskribi ĉiun landon sed nur per kelkaj ekzemploj montri la karakteron de la lingvaj problemoj. Kaj en la problemoj eŭropaj jam troviĝas preskaŭ ĉiu speco de problemo renkontebla ekster Eŭropo.

Norda Ameriko montras en Kanado batalon de la subpremita franc-lingva minoritato por lingva egaleco, kiu tre similas al la batalo en Belgujo, kun la diferenco, ke en Belgujo la francoj estis dominaj. En Usono la plej okulfrapa trajto estas la grandskala enmigro de Kubanoj, Portorikanoj kaj lastatempe Vjetnamoj, kio estas nur la plej novaj ondoj en procedo de enmigrado, kiu daŭras jam jarcentojn. La plej interesa nova fenomeno estas la agnosko fare de la federacia registaro, ke eble ĝi ne devas postuli de la enmigrintoj kompletan lingvan asimiliĝon — do adopton de la angla lingvo — sed ke ĝi anstataŭe devus havigi al ili la samajn rajtojn en iliaj propraj lingvoj, kiujn anglalingvanoj ĝuas en la angla. Multmilionaj projektoj pri federacia financa subteno al dulingvaj lernejoj estis grandparte fortranĉitaj fare de la parlamento. Tamen la movado por la rajto de ekzemple hispanlingvaj kaj ĉinlingvaj usonanoj ricevi lernejan instruadon parte aŭ eĉ tute en la hispana aŭ ĉina respektive forte kreskas. Kreskis ankaŭ la uzado de fremdaj lingvoj fare de oficialaj instancoj. En partoj de Ĉikago, ekzemple, ne nur preskaŭ ĉiuj butikoj estas hispanlingvaj, sed ankaŭ ĉiuj anoncoj oficialaj en la poŝtoŝeĵo, urbodomo kaj similaj lokoj estas presitaj dulingve. Antaŭ unu-du jaroj okazis unuafoje en Usono, ke unu komunumo en suda ŝtato estis jure rekonita kiel dulingva, tiel ke por ĉiuj oficialaj celoj estas rekonita la uzado kaj de la angla kaj de la franca. Same kiel en eŭropaj ŝtatoj, tamen, tiu favorado de la lingvoj de minoritatoj, kiu unuflanke ŝajnas justa kaj necesa, aliflanke kaŭzas gravajn ekonomikajn kaj administrajn problemojn kaj malfortigas la unuecon de la ŝtato Usono.

Estus tre interese, se iom post iom Usono evoluus de oficiale unulingva al oficiale plurlingva ŝtato, ĉar tio sendube havus sekvojn ankaŭ internacie.

De Usono ni saltu momenton al la aliaj superpotencoj, Soveta Unio kaj Ĉina Popola Respubliko. La soveta kazo tre similas al la jugoslava. Oficiale estas rekonita la ekzisto de ĉirkaŭ 130 lingvoj, kaj teorie ne ekzistas lingva diskriminacio. Tamen, malgraŭ la konata principo de Lenin, ke neniuj lingvo aŭ nacio havu privilegion, neniuj lingvo aŭ nacio estu subpremata, en la praktiko estas klare, ke la rusa lingvo dominas kaj estas nepre necesa por ĉiu, kiu volas progresi en la soveta socio. Tio neeviteble signifas, ke la rusa popolo havas denaskan privilegion super la aliaj popoloj. La influhava lingvisto Mahomet Isaev skribis antaŭ nelonge, ke “la rusa lingvo ludis gvidan rolon en la revoluciaj transformoj de nia ŝtato kaj meritas la amon kaj respekton de ĉiuj aliaj popoloj”. Esence la sorto de la minorita-

taj lingvoj en Soveta Unio verŝajne ne diferencos de tiu de tiaj lingvoj en Francujo, kie ili iom post iom cedas lokon al la lingvo de la centralisma aŭtoritato.

Laŭ la riceveblaj informoj ne ŝajnas, ke la principo de Lenin havis pli da sukceso transformiĝi el teorio en praktikon en la Ĉina Popola Respubliko. Ankaŭ tie la regadon de la tuta lando ebligas la disvastigo de la normigita hanlingvo de Pekino.

La sudamerika situacio estas preskaŭ transsaltebla, ĉar la tutan kontinenton okupis du eŭropaj lingvoj, la hispana kaj portugala, kiuj estas cetere proksimaj parencoj, tiel ke gravaj problemoj ne sentiĝas. Tute alia afero estas la situacio de la indiĝenaj lingvoj, kiuj, kun escepto de la gvarania lingvo en Paragvajo, estas preskaŭ komplete neglektataj kaj havas nenian politikan aŭ ekonomikan influon, pro la ekstrema malriĉeco de la popoloj, kiuj parolas ilin.

La hodiaŭa Afriko prezentas unu el la plej kuriozaj kaj potencie eksplodaj bildoj, kiujn oni povas trovi ie en la mondo. Ni lasu nun flanken la cetere pligraviĝantan araban lingvon en la nordaj landoj kaj konsideru nur la landojn sude de Saharo. Kiu rigardas la plejofte geometrie desegnitajn landlimojn de la ŝtatoj kaj komparas ilin kun mapo de la lingvoj kaj dialektoj de Afriko, trovas preskaŭ nenian punkton de koincido inter la du mapoj. Eŭropaj koloniistoj desegnis la landlimojn de la nunaj sendependaj afrikaj ŝtatoj tute sen konsidero al ilia historio, etna aŭ lingva konsisto. Sekve multaj popoloj troviĝas dividitaj inter du aŭ pli multaj ŝtatoj. Kun tre maloftaj esceptoj, la afrikaj ŝtatoj estas tiel multlingvaj en sia interna konsisto, ke eĉ ne estas verŝajne, ke unu aŭ alia indiĝena lingvo povus forpuŝi aŭ subpremi la ceterajn, kiel tio okazis en Eŭropo. La administrado de tiuj artefaritaj ŝtatoj estas efektivebla nur dank' al la konservado, fare de la elita regantaro en la ĉefurboj, de la eŭropaj lingvoj hereditaj de la koloniistoj. Malgraŭ bonintencaj klopodoj evoluigi kaj normigi la indiĝenajn lingvojn, al kio Unesko dediĉas multajn el siaj rimedoj, estas neverŝajne, ke estus eble krei en tiuj lingvoj, aŭ eĉ nur en kelkaj el ili (ĉar temas pri multaj centoj, el kiuj kelkaj estas parolataj de nur tre malgrandaj grupoj), literaturon adekvatan por supera aŭ eĉ nur mezgrada klerigo, almenaŭ en baldaŭa estonteco. Tio signifas, ke por la klerigo kaj por la ŝtata admininstrado la uzo de fremda lingvo — kiu cetere ludas rolon de neŭtrala interlingvo inter la diversaj triboj — estas nemalhavebla. Tamen estas atendeble, ke popoloj distranĉitaj de la koloniaj landlimoj — kiel ekzemple la haŭsoj en Niĝerio kaj Niĝerlando aŭ la somaloj en Somalio, Etiopio kaj Kenjo — iam postulos sian reunuigon, kio signifos konflikton kun la nunaj rego-centroj.

Fine ni turnu nin al la Azia koloso — kontinento tro vasta kaj diver-

skaraktera por esti resumita sub unu rubriko. Tamen, jam tuŝinte Ĉinuĵon, Japanuĵon kaj Sovetan Union, mi kuraĝos fari unu larĝan ĝeneraligon kaj diri, ke la plej rimarkinda lingva problemo en Hinda Unio, en Srilanko kaj Pakistano, Bangladeŝo kaj Birmujo, la landoj de Hinduĉinuĵo, Malajsio, Indonezio kaj Filipinoj — mallonge, en la tuta suda Azio — estas la problemo de klerigado. Ĉie oni frontas similan problemon, kiel en la afrikaj landoj, nome, ke la naciaj, indiĝenaj lingvoj, kvankam multaj el ili havas longan kaj gloran literaturan historion, plejparte ne havas modernan sciencan literaturon. En multaj kazoj la ŝtataj financaj rimedoj ankaŭ ne sufiĉas por evoluigi tian literaturon. Sekve la lernantoj estas devigitaj fariĝi laŭeble dulingvaj por povi adekvate studi ĝis universitata nivelo, ĉu pere de la angla, rusa aŭ ĉina lingvo. Singapuro, ekzemple, estas oficiale kvarlingva ŝtato. La lernantoj povas trapasi la fruajn stadiojn de sia edukado en sia propra gepatra lingvo, ĉu la angla, ĉina, tamila aŭ malaja. Tamen nur la angla kaj ĉina permesas daŭrigi la studojn al pli alta nivelo, tiel ke tamil- kaj malaj-lingvanoj tamen suferas diskriminacion malgraŭ ĉiaj leĝoj pri lingva egaleco.

En la internacia areno la lingva justeco ne estas multe pli granda. En la organoj de la Eŭropa Ekonomia Komunaĵo, ĉiuj lingvoj de la ŝtatoj-membroj oficiale estas egalaj kaj devas esti uzataj. Eĉ kelklinia oficiala deklaro de EEK, ekzemple, devas esti redaktita en ĉiuj ses oficialaj lingvoj (Irlando rezignis pri uzo de la gaela kaj kontentiĝas per la angla). Tamen, antaŭ la aliĝo de Britujo, Irlando kaj Danlando, ne estis sekreto, ke la franca lingvo praktike dominis la Komunaĵon kaj estis uzata en ĉiuj okazoj, kiam tradukado kaj interpretado ne estis formale devigitaj. Nuntempe ankaŭ la angla ludas gravan rolon. En ĉiu okazo, jam multfoje estis faritaj demandoj en la nederlanda parlamento proteste kontraŭ la fakto, ke la nederlanda lingvo ne estas uzata egalrange kun la aliaj lingvoj; kaj la samo validas por la itala kaj dana. Krome, ju pli da landoj aliĝos al EEK (laste petis aliĝon Grekujo, kio aldonus denove unu plian lingvon), des malpli funkcikapabla fariĝos la tuta aparato de tradukado kaj interpretado, kaj des pli oni estos tentata uzi praktikan, kvankam maljustan solvon per unu aŭ alia el la plej grandaj lingvoj. Konsideru, ke la nombro de interpretistoj kreskas geometrie rilate al la nombro de lingvoj. Se por du lingvoj oni bezonas du interpretistojn, por tri oni bezonas ses, por ses lingvoj necesas 30 kaj por 10 lingvoj jam minimume 90 interpretistoj devus esti ĉiam disponeblaj.

La tuta procedo de tradukado kaj interpretado en tiaj organizaĵoj estas ege multekosta. La kosto ĉe Unuiĝintaj Nacioj estis taksita antaŭ kelkaj jaroj je preskaŭ 20 milionoj da dolaroj, kaj intertempe ĝi kompreneble multe kreskis. La nombro de oficialaj kaj laboraj lingvoj senĉese kreskis

ĉe UN, Unesko, la Monda San-Organizo kaj similaj organizaĵoj, sub premo de la pli grandlingvaj ŝtatoj. Kiam pasintjare estis aldonita la araba kiel labora lingvo en multaj organoj de UN, tio okazis en la mezo de la naftokrizo, kiam la potenco de la arabaj ŝtatoj unuafoje sentiĝis tra la tuta mondo. Ne nur, ke neniuj ŝtatoj voĉdonis kontraŭ la proponon; entute ne okazis voĉdono, sed oni silente akceptis la decidon kiel memkompreneblan. Kvankam la arabaj ŝtatoj konsentis pagi la kostojn de tiu decido dum la unuaj jaroj, en sia venonta buĝeto UN jam devos trovi mem la financajn rimedojn. Tiu ekzemplo klare montras, ke la baza kriterio pri la lingvoj uzataj en internaciaj medioj estas la politika kaj ekonomika potenco de la koncernaj ŝtatoj. Antaŭ kelkaj jaroj la delegito de Japanujo ĉe Unuiĝintaj Nacioj, s-ro Urabe, prave protestis, ke la sistemo de oficialaj kaj laboraj lingvoj, el kiuj cetere la plimulto estas eŭropdevenaj, kontraŭdiras la bazan principon de la ĉarto de UN pri la egaleco de ĉiuj nacioj. Li atentigis, ke la ŝtatoj-membroj, kies lingvoj estas oficialaj aŭ laboraj ĉe UN, ĝuas grandegan privilegion kaj avantaĝon psikologian, politikan kaj fincan super la aliaj ŝtatoj. Tamen ankaŭ s-ro Urabe ne povis proponi pli justan solvon.

Ne estas fantazie supozi, ke en la baldaŭa estonteco ankaŭ la japana, germana kaj portugala lingvoj aldoniĝos al la angla, franca, hispana, rusa, ĉina kaj araba kiel laboraj lingvoj de UN. La rezulto estos kreskanta malpraktikeco de la sistemo. Raporto de UN jam en 1967 atentigis, ke ju pli multekosta fariĝas la produktado de dokumentoj en multaj lingvoj, des pli malkreskas la kapablo de UN dediĉi siajn limigitajn monrimedojn al la vere gravaj taskoj. Finfine, la batalo por lingva prestiĝo povas kripligi la organizaĵon.

Eĉ se teorie estus eble (kaj pageble) oficialigi ĉiujn oficialajn lingvojn de ĉiuj ŝtatoj-membroj de UN, tamen restus malekvilibro, ĉar iuj lingvoj, ekzemple la angla, estas uzataj de granda nombro da ŝtatoj. Krome, se ekzemple la hindia lingvo estus oficiala lingvo de UN, tamen restus la maljusta diskriminacio kontraŭ la bengala, la tamila, kaj ĉiuj aliaj lingvoj de Hinda Unio. La monda lingva situacio, kiu hodiaŭ favoras la anglan kaj kiu morgaŭ povos favori la araban, aŭ la rusan, aŭ la ĉinan, senĉese ŝanĝiĝadas, respegulante la ŝanĝojn de ekonomika kaj milita potenco kaj la luktheadon de iuj nacioj por superregi super aliaj. Tamen en unu aspekto ĝi restas eterne sensanga: ĝi restas ĉiam maljusta. Iom justan solvon povos prezenti verŝajne nur neŭtrala internacia lingvo, kiun ĉiuj popoloj devus lerni kaj kiu donus avantaĝon al neniuj. Unu tia lingvo, relative neŭtrala, estas la lingvo, en kiu mi elektis paroli al vi hodiaŭ: Esperanto. Tre bedaŭrinde, ĝis nun malantaŭ ĝi troviĝas neniuj financa forto, neniuj ekonomika potenco, neniuj politika premo de influiĉa ŝtato. En la ĝisnuna historio de la mondo, nur tiaj faktoroj estis kapablaj grandskale disvastigi la lingvojn.

Japanio — vidita de interne

Impresoj dum vojaĝo al kaj en la Lando de Sun-Leviĝo

1. Kie komenciĝas Japanio?

Sepjara knabo en ĉemontara eŭropa vilaĝo vidis la unuan fojon peceton de japana kulturo: la lingvo-gravuraĵon 'Monto Fuĵi kun Ondo' de Kacuŝika Hokusai. Dudek-kvin jarojn poste — neniam tiu unua impresoj perdis sian magian influon sur la animon — tridek-du-jara viro staras en la halgo de la aerhaveno de F. kun du valizoj kaj faras la lastajn paŝojn por ekflugo al tiu lando, pri kiu li studis kaj revis, sopiris kaj skeptikis dum la intertempo. La edzino, Kazumi-san, kaj la komuna filo, Tarô-kun, jam antaŭflugis monaton pli frue, por prepari ĉion en la hejmlando por la eŭropa edzo-patro. Nun li estas akompanata de amikino de l' edzino, Miŭako-san, fortika kaj energia kvardek-jarulino, lia lernantino de eŭropa nacilingvo.

Kie komenciĝas Japanio? Mi sentis, ke ĝi komenciĝis en la longa vico de japanoj, kiuj atendis la disdonon de la flugbiletoj por reiri al sia patro-resp. patrino-lando. Neniam antaŭe mi vidis tiom da gejapanoj en unu aro; neniam antaŭe al mi sonis la

japana lingvo tiel hejmece, kaj neni- am antaŭe mi sentis min tiel solidara kun la samnacionoj kaj samrasanoj de miaj edzino kaj ido. Optimisma, infaneca ĝojo kaj nervozo regas tiujn nigraharajn homojn. Ili estas studentoj revenantaj de eŭropaj semestroj; edzinoj de komercistoj laborantaj en diversaj eŭropaj metropoloj, akompanataj de viglaj, ĉiam gajaj infanoj; dignaj profesoroj grav-mienaj, kiuj serioze studis aŭ grekan arton aŭ germanajn dialektojn aŭ britan arkitekturon ktp.; jen kantistino, kiu debutis en okcidenta opero, jen skulptisto, juna, longhara kaj barba, kun ĉiele bela edzino.

Ĉiuj formas gajan kaj duonpacien- can grupeton, kvazaŭ de lernejoj, kiuj atendas grandan ekskurson de la lerneja jaro. Kvankam miaj staturo kaj harkoloro apartigas min de ili, tamen mi ne sentas min aparta. Mi ne flugas for al alilando aŭ eksterlando: mi iras de unu hejmlando, por finfine vidi la alian hejmlandon. Sed ĉu mi sentos ĝin hejmlando? Mi aŭdis tiom da onidiroj pri ekonomiaj problemoj, usona kulturinfluo, korup-

cio en la politiko, senpensa polucio de la lando, ke mi admonas min mem: 'Ne estu tro hasta, ne estu naiva, ne fariĝu tro entuziasma! Restu sobra kaj bone rigardu, ĉu tiu lando en realo vere kongruas kun la bildo, kiun vi faris al vi dum mult-jara legado de libroj, studado de la lingvo, kunvivado kun edzino, kaj mergiĝo en japanajn kulturerojn kiel teceremonio, florarango, kaligrafio, hajko-poezio. . .'

Nu, la interno de la aviadilo (jeto Boeing 747 de Japan-Aviada Kompanio) nepre jam estas japana teritorio, ne nur laŭ internacia juro. Ĉarmaj, afablaj stevardinoj salutas per 'Konniĉi ŭa!' (= 'Bonan tagon!'); la pasaĝereja laŭtparolilo milde disradiadas delikatan muzikon de kotoo (japana kuŝa harpo); beboj timeme krietas, pli aĝaj infanoj kuras inter la fotel-vicoj (kaj, tipe japane, ĉiuj plenkreskuloj paciencege toleras ilian bruon); plenkreskuloj komfortigas sin en la remburitaj sidlokoj kaj demetas la ŝuojn. La atmosfero estas tiu de gaja, kontenta, harmonia renkontiĝo, kia estas ideala por la japana sento.

La flugo daŭros dudek horojn kaj donas strangan senton de restado en ia intermondo. La vibrado de la maŝino daŭre zumas en la oreloj; jen kaj jen stevardinoj alportas verdan teon aŭ japanan bieron aŭ frandaĵojn por la

infanoj, kaj per ĉiam ridetanta mieno zorgas pri la bonfarto de la klientoj konfidantaj al ilia milda ŝirmado. Japanoj ŝajne havas la kapablon dormi kic ajn, kiam ajn kaj en kiu ajn korpa pozicio. Tiel baldaŭ (post manĝo jam prenita per haŝioj, manĝo-bastonetoj) la plimulto ŝajne dormas, aŭ iuj aŭskultas per kapaŭdiloj programojn de klasika muziko, internaciaj furorkantoj, japanaj sentimentaj ŝlagroj aŭ ridiga rakontado pri scenoj el la et-vivo de iuj komikaj personoj (japanlingve ĝin oni nomas 'rakugo'). La fenestroj estas fermitaj per ĵaluzioj, sed malgraŭ la dormiga krepusk-lumo en la aviadilo mi ne sukcesas dormi (dum apud mi Miŭako ŝajne jam sonĝas pri la revido kun ŝiaj fratino kaj aĝiganta patrino) kaj meditetas pri io nedifinebla, kiu fascinas min koncerne japanajn landon, kulturon kaj popolon. Ĉu mi eltrovos, kio ĝi estas? Ĉu ĝi entute ekzistas en realo, aŭ nur estas projekcio de mia fantazio? La tempo perdas sian normalan fluon (la suno tute subiras por dudek horoj; en F. ni ekflugis je la unua horo posttagmeze laŭ loka tempo; en la transit-aerhaveno de A. en Alasko ni haltas por unu horo, alvenante je la dua horo posttagmeze laŭ loka tempo. . .); mi sentas min kvazaŭ en iu 'arbaro inter la mondoj', kiel C. S. Lewis ĝin priskribis en la kronikoj de Narnia.

Miaj gamboj doloras pro longa sidado ; la oreloj ne plu povas toleri la sonon perceptitan tra la kapaŭdila programsistemo de muziko ; por legi mankas la interna trankvilo ; nun ankoraŭ daŭrigi la lernadon de japanaj vortoj ne eblas pro distriteco de la memoro. Sidante en la meza vico mi ne havas fenestron ĉe la sidloko. Mi do ŝovas min tra la koridoron ĝis la pordo, por rigardi malsupren tra fenestro. La panoramoj ĉiam estas nerealaj, jen maro de blankaj nuboj kiel kremo, jen neĝkovritaj montpintoj de Gronlando aŭ norda Kanado, jen iu rivero serpentumanta tra alaskaj praarbaroj kaj tundroj.

La nefluo de tempo estas transsaltita de la simultaneco de memoro kaj antaŭvido ; kiel antaŭ sep jaroj la bogepatroj kontraŭis tiun geedziĝon, kiu forlogis la pliaĝan filinon de ilia hejmo ; kion ili havos por diri aŭ pensi pri tiu fremda bofilo, apartenanta al aliaj lingvo, raso, kulturo, religio ? Kiel mi lutkis lernadi la lingvon de tute alia mentaleco kaj la ŝajne senfinan provizon de ĉinaj ideografiaĵoj, per kiuj la japanoj kutimas skribi parton de sia lingvo malparenca al la ĉina ; ĉu mi povos entute kontentige paroli kaj babili kun la amikoj, parencoj, gastigantoj renkontotaj ? Kiel la subtila, senintenca influo de la edzino, Kazumi (la nomo signifas 'Paca kaj bela'), enplantis en mia

koro la ligitecon kun la etoso de tiu antikva kaj tamen juneca kulturo ! Ĉu mi vere sentos min kiel fiŝo en la akvo, aŭ ĉu la kultura malsameco ŝokos min same kiel multajn eŭropanojn, kiuj post vizito al Japanio eldiris, ke ili estis en 'absolute nekomprenebla lando' ? . . . Tiel senfine turniĝas la rado de pensoj kaj teksas motivojn enigmajn, ŝpinas demandon post demando, ĝis la bobenoj malaperas en iuj malklaraj vizioj. . .

La dudek-hora atendado en la aviadilo, dum kiu mi ja estis en Japanio kaj tamen ne jam estis en Japanio (ĉu en iu Purgatorio, finfine ?) ŝajnis al mi simila al la intensiva kontemplacia trejnado de iu kompatinda Zen-monaĥo, al kiu la kruela majstro donis kontraŭlogikan, nesolveblan problemon, koanon, kaj tamen postulas per bruska voĉo, ke rapide alportiĝu la liberiga respondo — aŭ la animo de la vojserĉanto ne trovos la elirejon el la samsara rado de monda turmentiĝo. Mia koano estis : 'Kion mi serĉas en Japanio ?' Jam en la aviadilo mi spertis, feliĉe, ian satoron (iluminiĝon) : Antaŭ mi ploris bebo sur brako de laca patrino. Alpaŝis maljunulo, simpla naiva turisto verŝajne el kamparo, kaj konsolis trankvilige per faltiĝinta mano la etulon, kiu ĉesis la larmadon. Kiam mi vidis la vizaĝimpreson de tiu avĉjo, tiam mi vidis

Origino de Korelativa Tabelo

Korelativa tabelo ne ekzistas en Zamenhof, Unua Libro, 1887. Nek ĝi ekzistas en Zamenhof, Plena Vortaro Rusa-Internacia, 1889.

Ĝi ekzistas en la Zamenhova lernolibro (N-o 41), 1890.¹⁾ Sed jam pli frue ol 1889 t. e. en 1888 aperis tia tabelo en la lernolibro de L. Einstein (N-o 15).²⁾

En 1888 aperis la lernolibro en la hebrea lingvo de Hanez (N-o 13).³⁾ Mi ne povas vidi eĉ ĝian fotokopion, tial mi ne scias, ĉu en ĝi korelativa tabelo ekzistas aŭ ne. Einstein diras (p. 9) : por akiri klaran enrigardon kaj ekzaktan superrigardon mi skemigis tiujn vortojn.⁴⁾ Pro tio mi konjektas, ke tian tabelon faris por la unua fojo Einstein.

Tie ĉi mi donas fotokopiojn de la tabeloj en Einstein kaj Zamenhof.

Einstein, 1888 (p. 10)

I. Adjektivisch	II. Cognativ	III. Temporal	IV. Lokal	V. Modal	VI. Substantivisch	VII. Quantitativ	VIII. Relativ u. Indefinit.
maß für ein 1. kia	warum kial	wann kiam	wo kie	wie kiel	was kio	wie viel kiom	wer, welcher kiu
folgender 2. tia	darum tial	bann tiam	hört tie	so tiel	daß tio	soviel tiom	jener, der- jenige tiu
jeber 3. ĉia	—	immer ĉiam	überall ĉio	—	alles ĉio	—	jedermann ĉiu
irgend einer 4. ia	irgend warum ial	irgend wann iam	irgendwo ie	irgendwie iel	etwas io	ein wenig iom	jemand iu
kein nenia	—	niemaß neniam	nirgendß nenio	keineswegs neniel	nichts nenio	—	niemand neniu

unuanfoje realan Japanion. Kaj miaj okuloj kontraŭvole larmis. En tiu momento ĝojkrio venis de ĉe iu fene-

stro : Ni atingis la marbordon de la Ĉefinsulo de Japanio!

(Daŭrigota)

ia	ial	iam	ie	iel	ies	io	iom	iū
какой	почему	когда	гдѣ	какъ	что	что	сколько	кто
нибудѣ	нибудѣ	нибудѣ	будѣ	будѣ	будѣ	будѣ	нибудѣ	будѣ
kia	kial	kiam	kis	kiel	kies	kio	kioim	kis
какой	почему	когда	гдѣ	какъ	чей	что	сколько	кто, ко- торый
tia	tial	tiam	tis	tiel	ties	tio	tioim	tis
такой	потому	тогда	тамъ	такъ	того	то	столько	тотъ
ċia	ċial	ċiam	ċis	ċiel	ċies	ċio	ċioim	ċis
всякій,	по всякой	всегда	вездѣ	всячески	всякаго	все	всякое ко- личество	всякъ
всяческій	причины							неним
nenia	nenial	neniam	nenis	neniel	nenies	nenio	nenioim	nenis
никакой	безъ	никогда	нигда	никакъ	ничей	ничто	ни сколько	никто.
	всякой							
	причины							

Tuj ni povas rimarki, ke en la tabelo de Einstein mankas -es serio, dum en tiu de Zamenhof tiu serio ekzistas kaj en la tabelo de Einstein mankas 5 vortoj (*ĉial, ĉiel, ĉiom, nenial, neniom*), dum en tiu de Zamenhof, 1890 tiuj vortoj ekzistas (ĉiuj 45 lokoj en la tabelo estas plenigitaj).

Mi faris komparon: la tabelo en Einstein, korelativaj vortoj en Unua Libro (Un), Plena Vortaro Rusa-Internacia (RE), la tabelo en Zamenhofa lernolibro, 1890 (Vsem), korelativaj vortoj en Universala Vortaro (UV), Ekzercaro (Ekz).⁵⁾

En Un ne ekzistas korelativa tabelo, sed ekzistas korelativaj vortoj en la vortara folio aldonita al tiu libro kaj en la tekstoj. Ankaŭ en RE ne ekzistas la tabelo, sed ĝi enhavas iujn korelativajn vortojn. En Fundamento de Esperanto ne troviĝas tia tabelo.

Komparo A

	Un	Einstein	RE	Vsem	UV	Ekz
cial	—	—	—	+	—	+
ial	+	+	—	+	+	+
nenial	—	—	—	+	—	+
ie	+	+	—	+	+	+
ciel	—	—	+	+	+	+
ciom	—	—	—	+	—	+
neniom	—	—	+	+	—	+

En la tabelo de Einstein ne ekzistas -es serio, sed en la vortaro de D-ro

Esperanto aldonita al la libro troviĝas kelkaj -es vortoj.

Komparo B

	Un	Einstein (vortaro)	RE	Vsem	UV	Ekz
ies	+	+	—	+	+	+
kies	+	+	+	+	+	+
ties	—	—	—	+	—	+
ĉies	—	—	—	+	—	+
nenies	+	+	—	+	+	+

Ni rimarkas, ke tiuj 5 vortoj, mankantaj en Unua Libro, mankas ankaŭ en Einstein, t. e. *ĉial*, *nenial*, *ĉiel*, *ĉiom*, *neniom*.

En UV mankas *ĉial*, *nenial*, *ĉiom*, *neniom*, sed en ĝi troviĝas *ĉiel*.

Ties, *ĉies* ne troviĝas en Un kaj en Einstein (vortaro).

En Unua Libro *kian*, ... Einstein kaj RE jam akceptas *kiam*, ...

Pri RE ni devas bone memori, ke tiu vortaro ne estas Esperanto-Rusa, t. e. la kapvortoj ne estas Esperantaj.

Kial en Unua Libro mankas *ĉial*, *nenial*, *ĉiel*, *ĉiom*, *neniom*, *ties*, *ĉies*?

Mi konkludas, ke Zamenhof imitis Einstein pri tabeligado de korelativaj vortoj.

Komentoj:

1) Vsemirnyj Jazyk "Esperanto" ; polnyj učebnik.

2) La lingvo internacia als beste Lösung des internationalen Weltsprache-Problems: Vorwort, Grammatik und Styl nebst Stammwörter-Verzeichniss nach dem Entwurf des Pseudonymen Dr. Esperanto — Zum ersten Male methodisch geordnet und ausgearbeitet.

3) Safah achath lelulanu. Laŭ Holzhaus, Hanez estas alia persono ol Zamenhof. Kp. Doktoro kaj lingvo Esperanto, 1969, p. 332.

4) Originalo germana: Um aber einen deutlichen Einblick und eine genauere Uebersicht über die Correlation der Fürwörter mit den Umstandswörtern und unbestimmten Zahlwörtern zu erlangen, habe ich sie in umstehender Weise schematisch geordnet.

5) Por la farado de komparo mi utilis ankoraŭ ne publikigitan manuskripton de K. Ito, promenado tra komenctempaj vortaretoj (aperonta en la 5-a kajero de "iam kompletigota plena verkaro de l. l. zamenhof"). Koran dankon al li.

Bedaŭrinde en lia manuskripto Einstein ne estas traktata.

Pri UV kaj Ekz en Fundamento de Esperanto mi konsultis ankaŭ la verkon de Edward Ockey: Fundamenta Vortaro-Radikaro, 1975.

Verkis en Osaka, 1975-11-27

La memora foto

Sinjoro S. vivis kiel strata fotisto en iu turisma loko.

Sed lia okupo fariĝis des pli mal-prospera, ju pli disvastiĝis fotiloj. Li do estis devigita kultivi novan tere-non.

Ĉu ne troviĝas ie taŭga okupo? Post longa kontemplado, li fine ek-havis belan ideon, kiun li tuj ek-praktikis.

La nova laboro estis bazita ankaŭ sur la fotado. Li nur turnis la lens-fokuson al pli profitdona objekto.

Sinjoro S. luis ĉambron proksime de la prizono. De tie li povas, uzante teleskopan lenson, foti la pordon de la prizono. La pordo estis tamen ne tiu por la traĥiro de oficistoj, sed tiu destinita ekskluzive por la krimuloj, kiuj aŭ eniras por punlaboro aŭ eliras post liberigo.

Fotoj de la pordo mem estas, kompreneble, neaĉetataj, sed valoras ĝuste homo fotita antaŭ la pordo.

Li premas la obturilon, ĉiufoje kiam la pordo estas malfermita kaj eliras homo ĵus liberiginta. Kaj li sekrete lin postsekvas. Kompreneble, por ekscii kie li loĝas. Li atendas ĝis la fotito ekhavas ian profesion, kaj

jen li vizitas lin, alparolas :

— Ĉu vi ne volas aĉeti la memoran foton?

— Mi ne komprenas kion vi diras.

Nun la foton li transdonas al la fotito, kiu klinas nekomprene sian kapon.

— Jen via foto! Vi estas bele fotita. Atesto pri mia eksperteco en la arto.

— Mil tondroj! Kiu ja imagus, ke tia foto estas farita! Aĉeti? Ho ne, tute ne, neniel! Neniu volus havi tian memoraĵon. Estis sperto abomena, ĉiel forgesenda!

Tiel oni rifuzas en multaj okazoj. Cedi ĉe tio tamen signifas malvenkon liaflanke.

— Mi bedaŭras, ĉar mi esperis, ke vi nepre ĝin aĉetos. Sed ĝi valoras por mi nenion. Mi do permesos al mi senpage disdonaci ĝiajn kopiojn al viaj najbaroj kaj kompanianoj.

La fotito ĵus ekhavis modestan okupon por reveni al serioza vivo. Kion fari, se lia iama krimo estus diskonigita!

— Atendu, mi petas. Mi ja aĉetos ĝin. Je kia ajn kosto, kaj ankaŭ la negativon mi prenos.

Kaj li aĉetas pagante multan monon.

Certe iafoje fotito estis tiel rezistema, ke li traktis sinjoron S. tute apatie kaj repelis kun blasfemo : agu laŭ via bontrovo! Tiaokaze ankaŭ sinjoro S. ekflamiĝis, indigne multobligis kopiojn kaj dissendis ilin al liaj najbaroj.

Iam sinjoro S. renkontis fotiton kiu ne sole estis nevenkita, sed estis tiom pli ĝoja. La kaŭzon de plena fiasko ĉe la flanko de sinjoro S. li trovis, ke la fotito estas konata kanajlo, kiu fieras la plimultigon de la nombro de siaj katenitaj tagoj. Sinjoro S. intencis lin ĝeni, sed la efiko tute male utilis en tiu okazo, por helpi lin! Trovis malbonulo malbonulon pli grandan.

Sed tia kazo estas escepto el esceptoj. La okupo de sinjoro S. glate iris. Neniu atakito deziris, ke lia iama fiago estu diskonigita. Novaj klientoj aperis antaŭ li unu post la alia tra la pordo, kaj neniam elĉerpiĝis, ĉar ili estas sennombraj kiel marbordaj sableroj. Ege kontentiga estis la afero.

Unu tagon sinjoro S. vizitis junulon, komencis la regulan negocon :

— Jen foto. Eble vi volas ĝin havi pro la memoro?

— Ha, kiam vi fotis min tian?...

— Mi estas profesia fotisto. Se vi ne bezonus ĝin, mi permesos al mi

libere disdoni ĝiajn kopiojn. Sed mi avertas vin, ke la disdonado de la foto, atestanta vian liberigon el la prizono, ne estas bona afero por vi, junulo, kiu havas antaŭ si rozkoloran futuron.

— Kio? Vi minacas min! Ĉu vi volas profiti surbaze de mia malavantaĝo?

— Sed ĉiu aĉetas ja senreziste. Vi sentos vin plene refreŝigita post la aĉeto.

— Nepardonebla fiago!

Subite la junulo alsaltis lin, kaj en momentoj lin katenis per ŝnuro. Sinjoro S. estis surprizita, tamen ne konsternita.

— Ĉesigu vian absurdaĵon. Junulo agas simplanime. Eĉ kun perforto, vi vane forprenos de mi ĉi tiun foton. Sciu, ke la kopioj de la foto estas tiel aranĝitaj, ke ili dissendiĝos al pluraj homoj, se mi ne revenos hejmen antaŭ certa horo.

Sed tute neatendita estis la respondo de la junulo :

— Tio faras al mi nenion.

— Kion vi do faros?

— Mi telefonos al la polico, kaj vin transdonos al ĝi kiel krimulon.

— Ĝusta ideo, sed ne prudenta. Vi per tio disvastigos la fakton, ke vi estis kondamnita al punlaboro.

Trankvila estis sinjoro S. Sed ankaŭ la junulo estis trankvila.

— Mi estas trankvila, ĉar mi

Perditaj Sortoj

Krepusko kovris la urbon. En ties rando juna brunvizaĝa fortika viro pretigis forlasi la ĉambron.

„Kien vi iras, Mungo ?” — demandis arĝentvoĉa junulino kun blondaj haroj, kiuj ŝajnis eĉ blankaj en la lumfasko veninta el la fenestro.

“Mi havas ion prizorgi en la urbo !” iom krude respondis Mungo.

“Tio ja ne koncernas vin !”

“Se kara, ja ĉio, kio rilatas al vi, koncernas ankaŭ min ; ĉu vi ne scias tion jam de la komenco de nia unua renkontiĝo ? !”

“Estas aferoj, Romela, kiuj tamen apartenas nur al mi, mi havas taskojn, farotaĵojn, devojn ! Espereble vespere mi revenos al vi !”

“Verdire al mi ne plaĉas viaj

neniam punlaboris.

— Ne helpas mensogo. La foto atestas, ke vi post la liberiĝo eliras tra la pordo.

— Vi havas plenan rajton tiel opinii, sed mi estas ŝlosilvendisto. La foto prezentas min hejmen iri post instalado de nova ŝlosilo. Mi vin eĉ dankas, se la kopio estos multkvante disdonita. Se oni ekscios per

kelkfojaj apartaj iradoj kaj ili ŝajnas sekretaj. Ĉu ni ne devus havi de nun nur komunajn farojn, komunajn pensojn kaj ni devus ĉion scii unu pri la alia ! ?”

“Pardonu, Romela, mi ne sentas tion kaj cetere viro ĉiam rajtas havi ion, kion la alia ne devas scii, kio apartenas nur al mi !”

“Ŝajne vi tamen ne komprenas min, Mungo ! Ni havas en la vivo komunan taskon, se ni vere amas unu la alian, se ni vere apartenas unu al la alia kaj se ni deziras klare vidi, kion pensas, faras, celas la alia. Fine ni renkontiĝis — mi scias, tio ne estis hazardo — ke ni kune iru nian vojon en tiu ĉi tera vivo kaj ankaŭ post ĝi !”

tio, ke mi liveras ŝlosilon ankaŭ al la prizono, pliiĝos al mi la konfido kaj mi ĝuos bonan propagandon de mia afero.

La junulo telefonis. Sinjoro S. estis arestita de policano, kiu baldaŭ tien alvenis. Kaj li estis sendita en la prizonon ; tra la pordo al li tre memorinda . . .

Trad. de K. Matuba

“Ne ridigu min ĉiam — respondis kun cinika rideto Mungo — vi denove komencas viajn fabelojn jam delonge ne akcepteblajn. Kaj pri vivo post la nuna mi nek scias, nek kredas.”

“Ĉu vi ne kredas ? Vi rajtas tion fari ! Sed mi sentas, sed mi scias, ke nia vivo, niaj pensoj, agoj, inklinoj kaj celadoj havas nur tiam ian bazon, ian sencon, se ni konscias pri la vivo de la granda universo, pri la respondeco de nia vivo, de nia memo kaj pri daŭrigo en iu por ni nun ne komprenebla eterneco !” Mungo jam kolere ekmurmuris :

“Lasu fine viajn infanaĵojn ! Mi ne povas akcepti tion kaj mi devas ion nepre plenumi, mi jam diris al vi. Tio ne koncernas nian nunan vivon, nek ian neekzistantan postan !”

“Kara Mungo, mi estas tre malgoja pro tio ! Sed sciu, tio ne dependas de via kredo, ĉar ne vi disponas pri la sekvoj ! La posta vivo, kiu fluas en la eterneco, koncernas ankaŭ vin, egale, ĉu vi kredas, ĉu vi volas, aŭ ne !”

“Virina malsaĝaĵo. Mi nur miras, kiel mi povis enamiĝi en tia stulta knabino !”

“Mi jam diris — respondis la jtnulino — mi scias, ke tio estas nia komuna sorto kaj mia destino estas apud vi fari mian devon !” “Virinaj devoj, naivaĵoj ! Do adiaŭ Romela !”

Tion kriis jam senpacience Mungo kaj portante ian grandan skatolon forlasis la domon. Romela longe, triste, sopire rigardis post li.

En alia kvartalo Mungo renkontis siajn kunulojn, kiuj jam atindis lin. “Ĉu ĉio preta ?” ili demandis iom nerveze, sed tamen firme. “Jen la kala pakaĵo” rikane responbis Mungo. “Ni rapidu ĝustatempe atingi la lokon kie pasos la aŭtobuso. Ili kune ŝtele, kaŝe lerte pasis, kvazaŭ ŝvebante, tra la malhelaj stratoj al la ŝoseo, kie devis trapasi aŭtobuso revenonta el la ĉirkaŭaĵo. Ili zorge kaj lerte kaŝis la pakaĵon sur la vojo apud ŝtono kaj Mungo ion aranĝis sur la objekto. Oni jam aŭdis la knaradon de la veturilo. Ili do senvorte, silente malaperis en la najbaraj vojoj kaj rapidis al la kvartalo de la urbo. Baldaŭ aŭdiĝis terura knarego, eklumego, fajro, homa, virina, infana vekriadoj, disflugantaj ladpecoj, eksplodaj sonegoj, refalo de flugantaj ruboj kaj poste malhelo kaj morna silento. Baldaŭ aŭdiĝis la sirenoj de savambulancaj aŭtoj, de policaĵ veturiloj kaj en la noktiĝo la urbo estis alarmita pro la sciigo, ke denove okazis terura ataka akcidento, morto, vundiĝo, ruinoj de la aŭtobuso, ĉielskvanta krimo, pereco de ŝajne senkulpaĵ homoj, turmentoj, doloregoj, funebro. . .

Mungo eĉ kontente frotis siajn

manojn kaj diris :

“Nu, tio bone sukcesis! La fiuloj ricevis, kion ili meritas! Kaj la mondo denove ekkonu, ke ni eldevigos nian juston kaj nian rajton sur la tero!”

Baldaŭ li atingis sian hejmon kaj brute malfermis la pordon, preskaŭ falis en la ĉambron, kie Romela jam tremante atendis lin.

“Ĉu vi aŭdis, Mungo, la timigan sciigon! Denove okazis terura atenco kontraŭ senkulpaj homoj, eĉ virinoj kaj infanoj estis inter ili!”

“Kial vi diras, ke senkulpaj — ironie demandis Mungo — ja vi diris, ke ĉiuj homoj estas jam de la naskiĝo kulpaj!”

“Vi povas esti prava, sed en sia nuna vivo eble ili ne faris ion malbonan, ili laboris, ili serĉis sian vojon al vivteno, al progreso, al trovo de distriĝo, eble eĉ al pliboniĝo kaj al helpo de aliaj. Kaj nun iuj monstroj ĉion terure kaj dolorige finis. Jam la radio komunikis ekskuajn detalojn.

“Vi tion ne komprenas, Romela, — ja tia estas la vivo, devas okazi akcidentoj, pereoj kaj eĉ atentigoj, ke la regantaj homoj ne pensu, ke ilia volo, iliaj planoj estas nepre ĝustaj kaj neskueblaj!”

“Sed kara Mungo! — ekmiris Romela — ĉu vi pensas, ke tiaj kruelaĵoj povas ion helpi? Ja atencoj, murdoj nenion solvas, nur finas

vivojn, kaŭzas dolorojn, funebrojn sed ne deflankigos la vojon de la sorto, la vojon de la historio, la plenumon de tio, kio devas okazi!”

“Denove vi infanece babilas, Romela, — diris kolere Mungo, — oni devas atentigi la nunajn gvidantojn, la homojn, ke ili iras sur la malĝusta kaj maljusta vojo!”

“Sed Mungo! — kriis terurite Romela — kiu povas, kiu rajtas tion prijuĝi? Kiu rajtas tion tiel kruele solvi?” Mungo silente murmuris: “Feliĉe, estas tiaj bravuloj!”

“Kaj ĉu vi kuraĝas tiujn nomi bravuloj? Ili estas simple murdistoj!”

“Romela! ekkriis nun jam furioze Mungo — ne diru, ke ili estas murdistoj, ĉar ili estas herooj, la veraj filoj de la popolo, de la partio!”

“Vi parolas teruraĵojn, Mungo! Ĉu eble vi eĉ defendas kaj aprobas ilian agon?”

“Ni ne parolu plu pri tio, Romela,” diris Mungo. “Donu iom da manĝo. Mi estas laca, elĉerpita, mi devas manĝi ion, eĉ trinki kaj ripozi.” Romela senvorte, sed tre deprimate eliris kaj alportis iom da manĝo kaj trinkaĵo. Mungo bonapetite kaj ĉion englutante manĝis kaj trinkis. Oni tute ne povis rimarki maltrankvilon ĉe li. Romela silente observis lin kaj fine diris:

“Kara Mungo, min tre malĝojigis viaj opinioj. Se mi pensas nun ne pri

la viktimoj tiom bedaŭrindaj kiom pri ties familioj, sed pri la atencintoj, mi estas funebra, ĉar ilin atendas terura sorto !”

“Kio, kiel ?! — subite eksaltis Mungo — kiel vi kuraĝas tiel paroli pri tiuj viroj kaj antaŭdiri ilian sorton ? !”

“Kiel — ekmiris Romela — kiel vi scias, certe, ke tion faris ne unu viro, sed multaj ? Kaj ĉu inter ili vere ne estis virino ? Ĉu — ho pro Dio — eble vi eĉ konas ilin ?”

“Ne parolu pri tio, Romela ! Eĉ vorton mi ne volas plu aŭdi pri tio !”

Tiam oni frapis sur la pordego. Ŝvitkovrita viro enkuris. Romela ek-
timis. Mungo ekstaris.

“Kion vi volas ĉi tie ?” li dem-
mandis iom konsternite.

“Fuĝu, Mungo ! — diris la enpe-
netrinta viro — fuĝu, ĉar kelkaj
eksciis, kiuj estis tie ĉe la aŭtobuso
kaj eble iu malkaŝos ankaŭ vian
nomon !” Mungo eksaltis. “Ne palo-
lu, Ĉutro ! Fermu la buŝon !”

“Mia kara Dio ! ekkriegis Rome-
la — Ĉu do vi estis inter ili, Mungo !
Terure, kion vi faris, malfeliĉulo !
Kian krimegon ! Do tial vi parolis
tiamaniere pri la teroristoj ? !”

“Silentu, Romela, vi ne rajtas
prijuĝi min kaj miajn amikojn ! Ni
faris sanktan devon ! Kaj nenio povas
okazi al ni ! Eĉ se oni kaptus nin,
ankoraŭ estos, kiuj scios liberigi nin !

Mi ne timas !” Romela ekplo regis !
“Ho, Mungo, vane mi estis apud
vi, kiel gardaĝelo, vane mi avertis
vin, vane mi parolis al vi pri supera
vivo, pri sorto, pri alta justeco, pri
eterneco ! Kial vi ne kredis ! Ĉu vi
pensas, ke iu povas eviti sian sorton.
Se iujn trafis teruraĵo en la aŭtobuso,
tio estas ilia sorto, oni povus diri, ilia
karmo, sed vi surprenis novan, teru-
ran sorton, juĝon ne eviteblan en la
nuna aŭ en la estonta vivo, kio ajn
okazos al vi kaj kiel ajn iuj povos
liberigi vin ! La farojn sekvas la
sortojuĝo. Vane vi ne kredas, ke en
la eterneco ĉio devas iel egaliĝi ! Kaj
estas skribite en Sanktaj Skriboj —
ĉu vi ne kredas tion : kiu semas
venton, rikoltos tempeston ? Ĉiu ago
havas sian konsekvencon ! Ankaŭ vi
ne povas eviti ĝin. Timego kaptas
min kaj dolorego pro vi ambaŭ !
Pardonu mian ekscitiĝon. Sed teru-
re !” Kaj Romela ploregante falis
sur la tablon. La du viroj ektimigite,
nervoze kaj konsternite rigardis ŝin.
Unue Ĉutro ekparolis : “Pri tiaj
aferoj mi neniam aŭdis. Ĉu ĉio povas
esti vera !” Mungo provis ridetante
respondi : “Virinaj naivaĵoj, supersti-
ĉoj.”

“Ne, Mungo — nun eklevis sian
kapon Romela — mi de infaneco
lernis pri tio, mi eĉ ricevis sugestojn,
inspirojn, kiuj multon malkaŝis al mi.
Ho, kial vi ne kredis al mi, kiam mi

provis tion klarigi !”

“Sed se oni nin ne kaptos aŭ poste liberigos” — demandis Ĉutro — ĉu ni povos eviti malbonon ?”

“Kara Ĉutro — respondis iom pli trankvile Romela — oni devas por siaj progreso kaj pliboniĝo ricevi punon. Sed ne Dio punas, la universa Boneco kaj Inteligento, sed la homo per siaj pensoj, paroloj, faroj punas sin mem. Kaj kiel naive ridinde estas, se iu pensas per perfor-taj agoj ŝanĝi la sorton de popoloj, la historion, kion destinas la pli altaj fortoj sub regado de Dio. Ĉu iu el vi pensas, ke vi rajtas juĝi pri aliaj kaj plenumi verdiktojn ? ‘Ne juĝu, por ke vi ne estu juĝataj !’ diris la granda instruisto Jesuo. Per Moseo estas verdiktite en la Sankta Skribo : Ĉar la juĝo estas afero de Dio.”

“Sed kial estas allasataj de Dio tiaj aferoj, kiuj ŝajnas al mi maljustaj ?” demandis denove Ĉutro, dum Mungo obstine silentis.

“Kara Ĉutro, ni etaj homoj havante efemeran vivon sur ĉi tiu eta Tero, ne povas ĉion klare vidi, ni eĉ ne scias, kio estas nia sorto, pro kio okazas io al ni, al nia patrujo, al homamasoj ! Dio ja deklaris per granda profeto antaŭ multaj miljaroj : ‘Ĉar Miaj pensoj ne estas viaj pensoj, kaj viaj vojoj ne estas Miaj vojoj. . .’ Multon ni ne povas kompreni, sed ni ne rajtas juĝi kaj kruele enmiksiĝi

en la sorto de aliaj, provante aliformigi la historion ! La homaro ja ofte spertis, ke tiaj agoj ne alportas la deziritan.

“Vi fantazias Romela, kiel ĉiam ! — nun ekparolis Mungo — Kiel mi povis enamiĝi al vi, mi mem ne komprenas, ja vi estas tute alia ol mi, kaj ni apenaŭ povas kompreni unu la alian.”

“Mi jam diris al vi, ke ne estas hazardo, ke ni devis renkontiĝi kaj iom provi kune vivi, ĉar ni havas — eĉ se tion vi ne kredas, sed eble sentas — komunan taskon ! Mi certe estis sendita vole-nevole apud vin, kiel gardanĝelo : sendito de Dio kaj estus devinta vin devojigi el viaj ĝisnunaj pensoj, celoj, agoj. Kaj se tio ne sukcesis nun, kredu, mi volas kredi, fidi, ke tio okazos por ni en iu venonta vivo.”

“Stultaĵo, — diris Mungo — tion mi ne kredos, ĝis mi mem spertos.”

“Sed mi — interrompis Ĉutro — deziras kredi en tio, parolu plu, kara Romela. Tamen mi demandas, ĉu estas kaŭzo kaj sekvo, se iu faras kruelaĵojn kaj skandalojn ? Ĉu oni ne povas tamen saviĝi el ties sekvoj ?”

“Ĉutro — diris nun tre milde Romela — via demando estas komprenebla. La surtera vivo de la avidaj, egoistaj, regemaj homoj devas travivi faligaĵojn, tentojn, malbonaĵojn. Tamen estas granda graco kaj indulgo

de Dio : se iu pentas sian agon kaj volas sincere rebonigi sin mem, se iu volas pliboniĝi kaj serĉas la vojon al alta, vera, ama vivo, tiu ricevos — Dian pardonon kaj savon kaj trovos trankvilan, harmonian vivon, komprenante, ke ĉiuj situacioj kaj okazintaĵoj en la mallonga surtera vivo nenion signifas por la eterneco, kio ajn okazis al ni, ĉu ni perdis hejmon, havaĵon, forton, sanon ; eĉ tiuj servas por nia eduko al la progresigo de mia spirita evoluo.”

Nun ankaŭ Mungo mallevis sian kapon : “Do venu tio, kio estas destinita kaj kion ni meritas !”

“Bone, kara Mungo — ekkriis Romela — mi estas certa, ke ni renkontiĝos pli puraj kaj pli feliĉaj !”

En tiu momento aŭdiĝis terura frapado sur la pordo : “Malfermu, polico !” Kaj Mungo konscie leviĝis por malfermi la pordon . . .

(Trad. Paŭlo Balkányi, Hungarujo)

**iam kompletigota plena verkaro de I. I. Zamenhof
kajero 4 eliris en 1975**

tamen la afero progresas !

— komenca tempo de “lingvo internacia” —

— tole bindita. 444p. A5. 20gld. aŭ 2,000enoj. —

enhavo : leteroj kaj artikoloj el la jaroj 1896-1900 ; multaj el la leteroj estas libroforme presitaj nur en tiu ĉi libro ; krome la interesaj aldonoj kaj indeksoj de ludovikito.

— mondu ĉe UEA, JEI, KLEG, EPA k. a. —

(kajeroj 1, 2, 3 haveblaj kaj 5 en preparo)

eldonejo ludovikito